

Heroldo de Esperanto

Sendependa organo de la Esperanto-movado / Semajna / Internacia / Universala

Administracio: Köln a. Rh. (Kolonjo), Brüsseler Strasse 94, Germanlando.
Redakcio: Cefredaktoro: Teo Jung; resp. redaktoro: Joseph Berger;
anona redaktoro: Michael Wieland. Redakciaj kunlaborantoj en la tuta mondo. La redakcio ne resendas manuskriptojn; retenu por vi kopion!
Agentejoj en Amsterdam, Antwerpen, Athenaj, Barcelona, Bucuresti, Budapeŝt, Cluj, Helsinki, Hradec Králové, Liverpool, Lisboa, Paris, Montevideo, Riga, Rio de Janeiro, San Francisco, Sofia, Stockholm, Tallinn, Tokio, Warszawa, Zagreb. La precizaj adresoj de la Agentejoj troviĝas en nia Tarifo, senpage sendata laŭ deziro al ĉiu petanto.

Deka Jarkolekto
N-ro 22 (518)
31 majo 1929
(12-paĝa)

Prezo de Abono: Jarabono 12 germ. rmk. Unu numero 0.30 germ. rmk. Petu nian Tarifon kun specialaj prezoj en la diverslandaj valutoj!
Prezo de Anoncoj: po unucentimetra kolonero (62 mm larĝa) 1.20 rmk. Anoncoj kostas po vorto aŭ mallongigo 0.05 rmk., minimume 1 rmk.
Banka konto: Deutsche Bank. — Poŝtaj ĉekkontoj (ĉiuj niaj kontoj funkcias sub la firmo „Heroldo de Esperanto, Köln, Germanlando“): Bruxelles 204.404; Budapeŝt 59.379; Köbenhavn 49.62; Köln 1117.76; Milano 3/954; Praha 781.93; St. Gallen IX/4602; Stockholm 41.80; Warszawa 191.094; Wien D 62.473; Zagreb 408.14; Zeist 130.630.



Estas jam malnova tradicio en Esperantujo, ke ĉiujare alfluas riveretoj, riveroj kaj riveregoj da verdstelanoj al iu granda centra baseno; ĉiujare alia urbo nacia fariĝas ĉefurbo de nia verda regno superlima, efikanta kiel fokuso kiu kolektas ĉiujn verdajn radiojn. En la nuna jaro Budapeŝt estos tiu verda centro, en kiu flamos nia entuziasmo, sprucos nia energio, renoviĝos nia sindono al la granda afero kaj la alta celo, al kiuj ni servados ĝis la plenvenko. — La LKK de la XXI-a kaj Heroldo de Esperanto en kunlaboro prezentas al vi, estimataj gelegantoj, Budapeŝtan numeron. Vestita per la koloroj de nia nunjara metropolo esperantista, ĝi emas esperi, ke en tia festa aspekto ĝi kapablas jam nun injekti en vin tiun ĝojon, kiun ni ĉiuj sentas en nia „granda rondo familia“. Por konigi al vi jam nun, almenaŭ bilde kaj vorte, la ĉefajn sciindaĵojn, vidindaĵojn, mirindaĵojn de la kongresaj urbo kaj lando, la Budapeŝta numero volas laŭpove kunhelpi. Ke ĝi atingu plene tiun celon kaj veku en vi ĉiuj vivan volon ĉeesti ne nur anime, sed ankaŭ korpe nian ĉi-jaran mondfeston, tio estas la modesta deziro tiel de LKK kiel de Heroldo.

EK' AL BUDAPEST!

PROLOGO ANTAŬ LA MONDTEATRO.
AL LA TUTMONDA ESPERANTISTARO.

Ĉiujare kurteno leviĝas antaŭ la tutmonda esperantistaro, por malkovri la pejzaĝojn, naciajn kaj kulturan vivon de alia lando kaj popolo. Gefiloj de ĉiuj nacioj havas la eblecon ekkoni ofte ĝis tiam tute ne konatajn landojn, kutimojn, morojn, krei amikan rilaton al nacio, kiu ĝis tiam estis eble ekster ilia konscio. Ĉio ĉi okazas facile, mirakle kaj agrable dum unu semajno per unu lingvo.

Ankaŭ nunjare leviĝas la kurteno de la mondteatro por montri al vi malmulte konatan landon: Hungarujo. Pri tiu lando, kiu staras per sia nehindo-eŭropdevena popolo kiel insuleto en la maro de aligentaj, germanaj, slavaj kaj rumanaj popoloj, oni scias tre malmulte en la mondo kaj ankaŭ tion plej ofte erare. Amika rigardo al tiu multe batalinta nacio montras, ke ankaŭ ĝi ĝojas kaj malĝojas, kiel ĉiu alia, ke la homoj tie estas simile bonaj kaj malbonaj, kiel en la tuta mondo, ke ankaŭ ĝi povas prezenti mirindajn trezorojn per belaj pejzaĝoj kaj kulturaj valoroj kaj etendas al vi varman koron, amikan manon kaj gastaman brakon.

„Heroldo de Esperanto“ ebligas al vi jam nun iom en-

rigardi la nekonatan landon, la nunjaran ĉefurbon de Esperantujo. Jen aperas malantaŭ la kurteno, vico post vico, armeoj da artikoloj, soldatoj de literoj, parolantoj pri estintaj bataloj, laboroj, klopodoj kaj dezirantaj evoluojn kaj pacon.

Lasu pretermarŝi antaŭ viaj okuloj nian plumban armeon da liter-soldatoj. Ekvidu la batantan koron malantaŭ la simpla, kelkfoje ĉifonita vestaĵo kaj — venu poste al nia mondkongreso, por ke antaŭ viaj okuloj ekaperu ankaŭ en realeco la vicoj de la pejzaĝoj, la soldatoj de la kultur bataloj kaj de la ĉiutaga vivo. — Praktike utiligante Esperanton, disvastigante viajn sciojn, agrable pasigante vian libertempon, registru inter viajn memorojn novan urbon kaj novan landon, aldonu al viaj amikoj unu novan nacion, kreskigante, firmigante la senton de homara solidareco, la bazon de estonta tutmonda paco!

Ni atentigas ankaŭ pri la maja-junia numero de Verda Stelo, kiu parte ankaŭ parolos al vi pri Hungarujo, precipe pri ĝia literaturo.


HUNGARUJO, LA KONGRESLANDO.

HISTORIA RESUMO. La historio de Hungarujo komenciĝas je la fino de la naŭa jarcento, kiam la hungaraj gentoj elmigrintaj el „Etelköz“ (interrivero) fondis sur la floranta ebenaĵo etendiĝanta inter la riveroj Danubo kaj Tibisko konstantan hejmon. La sep hungaraj gentoj tiutempe uniĝis sub la estreco de duko Árpád kaj la Árpád-idoj portis dum jarcentoj la reĝan kronon de la reĝo S-ta Stefano, kiu krono post la morto de Andreo III-a ornamis la kapojn de elektitaj reĝoj kaj fine tiujn de la Habsburgoj. La gloran estintecon de Hungarujo priskribi en kadro de mallonga resumo estas neeble, tamen ni devas citi la nomojn de la reĝoj Kolomano Könyves kaj Matiaso, kiuj enskribis siajn nomojn ne nur en la libron de la hungarlanda, sed eĉ en la libron de la mondhistorio. Kolomano Könyves estis la plejklera reganto de sia epoko; jam en la XIII-a jarcento li deklaris, ke sorĉistinoj ne ekzistas kaj malpermesis ilian persekutadon. Reĝo Matiaso aranĝis ne nur glorplenajn militirojn kontraŭ la ĉiam pli potencaj turkoj, sed li estis vere sperta kaj grandanima protektanto de sciencoj kaj artoj. La Korvina-kodo dum sia regado pretigita estas ankaŭ hodiaŭ la plej granda gloro de la hungara scienco kaj de la Budapeŝta nacia muzeo. Hungarujo elektis en la XVII-a jarcento reganton el la familio Habsburg. Tiel ekestis la aŭstra-hungara monarkio, kiu ĉesis pro la mondmilito en la jaro 1918. Hungarujo, kvankam teritorie ege malgrandigita, tamen konservis sian sendependecon. La leĝojn donas la parlamento per elekto kunvokita, la reĝajn rajtojn ekzercas la elektita guberniestro.

GEOGRAFIA SITUACIO. La teritorio de Hungarujo depost la packontrakto de Trianon havas 92 720 kvadratkilometrojn; ĝi estas plejgrandparte ebenaĵo, havante montregionon nur okcidente kaj norde. Norde limigas ĝin Ĉeĥoslovakujo, oriente kaj sudoriente Rumanujo, sude Jugoslavujo kaj okcidente Aŭstrujo. La ĉefaj riveroj de Hungarujo estas la Danubo kaj la Tibisko. Norda limo de la lando estas la Danubo ĝis la enfluo de la rivero Ipoly; de Szob ĝis la transaĵo de Mohács la dekstra, kiel ankaŭ la maldekstra bordo estas hungara. Parte sur hungarateritorio fluas la Hernád, Sajó, Bodrog, Körös kaj Maroš; tute hungaraj riveroj estas la Zagyva (elp. Zadjva), kiu enfluas en la Tibiskon kaj la Sío, kies akvoj grandigas la

Danubon. La plej granda staranta akvo estas la lago Balaton, kies amplekso estas 650 kvadrataj kilometroj. Tiu ĉi lago etendiĝas en la mezo de la transdanuba montaregiono, kaj banejoj kaj somerrestadejoj okupas ĝian bordon.

LA HODIAUA HUNGARUJO. Laŭ la plejnovaj statistikaj datoj, la nombro de la loĝantaro en Hungarujo estas 8 000 000. 69% de la urba loĝantaro vivas en la ĉefurbo Budapeŝt, 31% en mezgrandaj kaj malgrandaj urboj. Budapeŝt multe pligrandiĝis depost la milito, ĉar multaj familioj hungaraj translokiĝis el la grandurboj de la forigitaj landpartoj ĉi tien. 90% de la loĝantaro estas hungarlingva, la ceteraj estas germanoj, malmultaj slovakoj kaj plimalmultaj rumanoj. La plejgranda parto de la loĝantaro okupas sin per terkulturo. La terspaco, taŭga por agrikulturo estas kvin milionoj kaj duono da



MONUMENTO DE MILJARA HUNGARUJO.

BUDAPEST LA KORO DE HUNGARUJO.

Pri la belecoj de Budapest rakontas mirindaĵojn tiu, kiu ĝin foje vidis. Ĉi tie estas la plej belaj konstruaĵoj, la plej ŝatataj amuzejoj, la legdona forumo kaj ĉiuj ceteraĵoj de la lando, kiujn milionogata urbo povas enhavi.

La historio de Budapest komenciĝas en la epoko de la romanoj, kiuj sur la flanko de Buda fondis la urbon „Aquincum“, kies ruinoj estas ĝis hodiaŭ videblaj. Estas sendube, ke jam la romanoj uzis, kiel sanigajn banejojn, tiujn varmajn fontojn, kiuj estas multnombro troveblaj en la flanko de Buda.

Buda fariĝis la ĉefurbo de la lando sub la reĝo Matiaso. La justema reĝo traktis tie kun la senditoj de la eksterlando kaj ŝanĝis ideojn kun la scienculoj en sia tiea palaco. Poste ankaŭ la turkoj de tie administris la okupitajn hungarajn teritoriojn. Post la forigo de la turkoj komenciĝis evolui sur la dekstra bordo de la Danubo estiĝanta Pest, kiu fariĝis dum apenaŭ unu jarcento el sensignifa urbeto belega grandurbo. Hodiaŭ Budapest havas unu milionon da loĝantoj, do tie loĝas 15% de la landloĝantaro.

En la mondo preskaŭ ne ekzistas urbo, kiu havas pli belan aspekton ol Budapest. Sur unu flanko de la Danubo, Buda etendiĝas sub la Gellért-monto, kronita per citadelo (monto de S-ta Gerhardo). Oni konstruis Buda'n en la valo kaj sur la montetoj, kies plej altiganta punkto estas la reĝa palaco. Frapanta estas apude la gracia turo de la preĝejo de Matiaso konstruita en pura gotika stilo, kaj la Fiŝista Bastiono kiu, rigardate de la Pesta flanko, estas tiel bela, kiel pompoplana puntornamento. Kontraŭflanke, kunigita per ses pontoj, etendiĝas la Pesta parto, kun siaj grandegaj, modernaj konstruaĵoj kaj bulvaroj. Sur la tiea bordo de la Danubo oni povas vidi la palacon de la Parlamento, mondifaman kreaĵon laŭ moderna gotika stilo.

Dum kiom da tempo Budapest evoluis tia, kia ĝi hodiaŭ estas, tion plejbone karakterizas la fakto, ke la unua konstanta ponto estis transdonita nur en la jaro 1848 al la komuna uzado. Ĝi estis la ĉenponto, kiun projektis Adam Clark, angla inĝeniero. De tiu tempo oni konstruis ankoraŭ kvin pontojn. En la jaro 1902 estis malfermita la Elizabet-ponto, kiu same estas arta konstruaĵo. Inter Buda kaj Pest, en la mezo de la Danubo etendiĝas la insulo de S-ta Margareto, bela kaj ŝatata refreŝiga kaj amuza loko. Dum jarcentoj eĉ laŭta vorto ne rompis la silenton de la belega loko; monaĥinejo estis sur ĝi kaj preĝantaj monaĥinoj promenadis sub la insul-arboj. La insulo hodiaŭ estas la propraĵo de la ĉefurbo. Ĝi estas kunigita per la Margareta ponto, do ne nur ŝipoj povas albridiĝi, sed ĝi estas piede kaj veturibile atingebla por la publiko serĉanta amuzon kaj ripozon. La ĉefurbo elspezis milionojn por la beligo de la insulo. Hodiaŭ vizitas ĝiajn ĝardenojn, banejojn, restaŭraciojn kaj ludejojn somere kaj vintre dekmiloj da homoj. Laŭ la eldiro de fremdaj vizitantoj, dum la someraj vesperoj ĉiu Budapeŝtano troviĝas sur la Margaret-insulo.

La urbon Budapest la naturo rice benis per sanigaj kaj refreŝigaj fontoj, pro kio ĝi nomiĝas Banurbo. La akvo de la fontoj estas plej grandparte varma kaj sulfurhava kaj ĉe ĉiuj artikusferoj speciale saniga. El ĝiaj banejoj la plej rimarkindaj estas: la Széchenyi-banejo, arteza banejo sur la Pesta flanko; la Sal-banejo en Kelenföld, la S-ta Gerhard-banejo, la Lukas-banejo, la Ru-



KALVIN-PLACO. EN LA FONDO LA NACIA MUZEO.

hektaroj; la ĉefaj produktaĵoj estas laŭvice: tritiko, maizo, hordeo, sekalo kaj aveno. Menciinda estas la vinproduktado de la lando, same ankaŭ la bestbredado. Per la disdivido de sia teritorio Hungarujo perdis la plej grandan parton de sia industrio, sed la situacio tiurilate konstante pliboniĝas. Budapeŝto estas granda industri-urbo, ĝiaj muzeoj, maŝinaj fabrikoj, bierfarejoj, teksaj-fabrikoj egalas la samspecajn, plej grandajn eksterlandajn fabrikojn. Pli grandajn industriejojn havas: Szeged, Győr, Diósgyőri; karbominejojn Pécs, Tata kaj Diósgyőr. Al la priskribo de la hodiaŭa Hungarujo apartenas ankaŭ la fakto, ke ĝiaj financaj aferoj estas tute ordigitaj, ĉar ĝia valuto, la »pengő« havas oran egvaloron kaj la ŝtataj enspezoj egalas la elspezojn. Menciinde estas ankaŭ ke Hungarujo en kulturaj sferoj akiris por si gravan rolon dum la ĵus pasintaj jardekoj. Ĝiaj artistoj kaj verkistoj estas konataj ankaŭ ekster la limoj de la lando.

VAGADO TRA HUNGARUJO. Okcidente limigas Hungarujon parte la Danubo, parte Aŭstrio. Ĉi tiu parto estas „Transdanubio“, kiu nomiĝis en la antikva roma epoko „Pannonia“. Ĉi tie oni fondis la abatejon Pannonhalma, kiu ĝis hodiaŭ bele prosperas. La geografia vidindaĵo de Transdanubio estas la lago Balaton, kiu havas longecon de okdek kilometroj kaj larĝecon de dek-dektri kilometroj kaj estas tiel unu el la plej grandaj lagoj de Eŭropo. El Budapest ambaŭ bordoj estas facile atingeblaj dum du kaj duono aŭ tri horoj. Inter la ĉebordaj urboj intertrafikas ankaŭ vaporŝipoj.

La Balaton meritas, ke ni dediĉu al ĝi apartan ĉapitron. Ĝian nordan flankon borderas montoj kaj montetoj el vulkana deveno, ĝia suda flanko estas ebena kaj por banado tre taŭga. Kiel vidindaĵo ĝi faras neforgeseblan impreson al la rigardanto, kiel banejo ĝi estas refreŝiga kaj vere saniga. Sur la bordoj estas longa vico da malnovaj urboj kaj banlokoj. Unu el la plej famaj estas Balatonfüred, ĝi havas krom la lagobanejo ankaŭ karbon-acidajn fontojn, kiuj tre bone efikas ĉe kormalsanoj. Belaj kaj bone vizitataj lokoj estas ankaŭ Siófok, Balatonföldvár, Tihany, Héviz. La akvo de la lago donas ne nur amuzon por kelkdek miloj da vizitantoj, sed estas precipe saniga por diversaj infanmalsanoj kaj nervataĵoj. Sur la lago Balaton la vizitanto trovas nature ĉiuspecajn akvoŝportojn, vintre li povas glitveturi per glitilo aŭ per glitveturilo sur la glacio ktp.

Vojirante nord-okcidenten, ni alvenas la urbon Sopron, kiun karakterizas ĝia malnova kulturo. La urbo Győr, apud la Danubo, estas vigla komerca kaj industria urbo. De sur la Danubo estas videbla ankaŭ Esztergom, la malnova kronadurbo, la sidejo de la hungara princo-primato. La plejaltiganta punkto de la urbo estas la baziliko, konstruita sur alta montplataĵo. De Esztergom ĝis Budapeŝto la Danubo vidigas al ni multe da belaĵoj, ĉar laŭ la bordoj sin sekvas ruinoj de antikvaj kasteloj kaj modernaj vilaoj. Neniu preterlasu tiun ĉi ŝipveturadon, se li nur iomete havas tempon. El Budapeŝto norden kaj suden ĉiutage intertrafikas komfortaj rapidŝipoj.

En la interna teritorio de Transdanubio, sur la deklivo de la Mecsek-montaro etendiĝas la urbo Pécs kun siaj multaj antikvaj preĝejoj, kun la universitato kaj karbminejoj. Ĉi tie pretiĝas la mond-famaj Zsolnay-fajencoj. Aliaj gravaj urboj estas ankoraŭ Szombathely, Veszprém, kaj Székesfehérvár. La lasta estis la entombigloko de la iamaj hungaraj reĝoj. La teritorio inter la Danubo kaj la Tibisko estas la granda hungara ebenaĵo, la grenejo de Hungarujo kaj unu el la plej gravaj tritiko-produktejoj de la mondo. Sur la ebenaĵo loĝas la plejmulto de la hungara loĝantaro, ĉi tie estas la miloj da bienetoj, vilaĝoj kaj urbetoj, kies ĉiujn nutras la tero kaj la diligentaj hungaraj manoj. La plejmenciindaj urboj de tiu ĉi teritorio estas Cegléd, Kecskemét, Nagykőrös, kiuj provizas Budapeŝton ne nur per pano, sed ankaŭ per fruktoj kaj legomoj. Rimarkindaj urboj estas

ankoraŭ Kiskunfélegyháza, Kunszentmiklós, Kiskunhalaŝ; borde de la Danubo kuŝas Kalocsa, malnova ĉefepiskopa restadejo kaj Baja. Gravaj urboj de la Tibisko-regiono estas Szolnok kaj Csongrád.

Ĉe la enfluejo de la rivero Maros en la Tibiskon estas Szeged, la dua plejgranda kaj plejmoderna urbo de Hungarujo. Szeged kun siaj 130 000 loĝantoj estas granda komerca kaj industria centro kaj universitata urbo. La granda inundo en la jaro 1879 tute ruinigis ĝin, sed ĝi estis rapide novkonstruita kaj fariĝis pli bela, ol antaŭe. Szeged havas du belajn statuojn, la unu estas tiu de Ludoviko Kossuth, la alia reprezentas Ludovikon Tisza, kiu kiel komisiito gvidis la novkonstruajn laborojn. La plej gravaj urboj de dekstraborda teritorio de la Tibisko estas: Miskolc, komerca kaj industria centro, Eger, ĉefepiskopa urbo kun sia fama jurista liceo; Gyöngyös, vinberkultur-loko; la praurbo Sárospatak, kun sia malnova kolegio; Sátoraljaujhely kaj Tokaj, kies vinoj estas mondfamaj. Sur tiu ĉi teritorio kuŝas ankaŭ la montaroj de Hungarujo, la Cserhát, la Mátra, la Bükk kaj Avaŝ. En la najbareco de Miskolc kuŝas la ferproduktejo de Diósgyőr kaj Lillafüred, ŝatata somerrestadejo. Norde de Miskolc la stalaktitgroto de Agttelek estas mondkonata geologia kuriozaĵo. Inter Budapeŝto kaj Miskolc troviĝas Mezökövesd, kiu pri sia arta hejmindustrio estas konata. La centro de la transtibiska ebena teritorio estas Debrecen, kiu kun siaj 100 000 loĝantoj estas la tria plejgranda urbo de Hungarujo. Debrecen ludis jam en la XVI-a jarcento gravan rolon en la kultura vivo de Hungarujo, ĉar ĝia reformita kolegio datas el tiu tempo. En ĉi tiu urbo oni proklamis la sendependecon de Hungarujo en la jaro 1849, la 14-an de aprilo. La urbo Debrecen vivas precipe el la agrikulturo kaj multaj tre bonhavaj terkulturistoj loĝas en ĝi. En la proksimeco de la urbo etendiĝas la 40 000 hubojn vasta Hortobágy puszta. Ĝi apartenas al la urbo Debrecen, kiun oni uzas por paŝtejo. Dum varmaj someraj tagoj oni ofte vidas ĉi tie la miraĝon (Fata-morgana), kiun multaj hungaraj verkistoj kaj poetoj priskribis. Maŭro Jókai skribas en siaj romanoj kun speciala entuziasmo pri la Hortobágy kaj pri la ĉevalistoj de la Hortobágy. Proksime al Debrecen kuŝantaj agrikulturaj urboj estas: Hajdöbösörmény, Hajdúnánás, kaj Hajdusoboszló, Békéscsaba, Gyula, Szentes, Hódmezővásárhely, ĉiuj urboj, kies loĝantaro vivas el la terkulturo.

Trad. P. Gyula Lajos.

LA ANTIKVA BUDAPEST.

La unua fakto, kiun rimarkas fremdulo enirante Budapeŝton estas, ke li vidas tute modernan grandurbon. Kvazaŭ parto el Ameriko — la lando de senlimaj eblecoj — estus transportata en Hungarujon, tiel rapide konstruiĝadis nia metropolo.

Oni tiel malmulte sciis en la eksterlandoj pri Hungarujo kaj Budapest, ke la fremdulo eĉ ne imagas, ke meze de Eŭropo kuŝas moderna grandurbo kun estinteco preskaŭ dumiljara. En la Hungara Nacia Muzeo troviĝas antikva altarsurskribo pruvanta, ke en iamaj tempoj loĝis kelta gento sur la teritorio de nia ĉefurbo. Postuloj de la keltoj fariĝis la romanoj, kiuj fondis urbon kaj fortikaĵon apud la Danubo, nomita Akvinkum, kies postrestaĵoj estas ankoraŭ videblaj. La romanoj posedis la teritorion ĝis la kvara jarcento post Kristo. Ili posteuloj, la slavo, detruis la urbon romanon tiel, ke restis nur kelkaj faliĝantaj muroj kiel signoj de la iam florinta kulturo. Laŭdire establiĝis sur tiu teritorio Attila, reĝo de la hunoj. La nomo de la urbo tamen pravas, ke post la romanoj okupis slavo tiun parton, ĉar la nomo Buda devenas el „voda“, kiu signifas akvon. La postaj germanaj koloniistoj nomis la urbon „Ofen“, kiu signifas fornon. Tiun

Hungarujo, ponto inter Okcidento kaj Oriento. Nepre ĝin vizitu!

Budapest, juvelo inter la urboj apud-danubaj. Venu ĝin admirati!

nomon pravigas la varmegaj fontoj de la nomita urbparto. Do, ambaŭ nomoj pruvas, ke la varmegaj kuracigfontoj de Buda estis konataj kaj aplikataj jam antaŭ dumil jaroj. — La slava urbo, kiu etendiĝis sur ambaŭ flankoj de l' Danubo, estis tamen mallongdaŭra, ĉar en la komenco de l' dektria jarcento jam staris ĉi tie granda kolonio germana. La tata invado detruis ankaŭ la germanan urbon. Sed kiam forpasis la mongola danĝero, denove reviviĝis la urbo. La malvasta kadro de tiu artikolo ne permesas detalan rakonton historian, pro tio ni mencias nur la ĉefajn momentojn de la evoluado de Budapest.

La glortempo de Buda komenciĝas per regado de l' reĝo Sigismundo (1387) kaj atingas floradon dum regado de l' granda reĝo Matiaso (1458—1490), kiam la urbo fariĝis centro de scienco kaj arto, ĉar la reĝo venigis tien la plej famajn scienculojn kaj artistojn tiamaĵn. La eĉ hodiaŭ famega libraro „Corvina“ konsistanta el 3000 libroj pruvas la tiaman sciencan vivon. — Post morto de l' reĝo Matiaso sekvis dekadenco, kiu fariĝis plej profunda post la malfeliĉa batalo de Mohács (1526), ĉar post ĝi regis la venkintaj turkoj dum 150 jaroj en la ĉefurbo kaj en granda parto de Hungarujo. La nura bono de l' turka regado estis la konstruo de pluraj banejoj en Buda, kiuj plejparte postrestis ĝis hodiaŭ. En la jaro 1686, la hungaraj trupoj sub gvidado de Karlo de Lotaringio sukcesis forpeli la turkojn. Sed je kia prezo! La floranta urbo estis bruligita dumbatalo kaj senigita de ĝia loĝantaro. En posta tempo oni allogis germanajn koloniistojn, kaj el tio sekvas, ke la karaktero de la urbo fariĝis germana. Ĝian evoluon malhelpis nova katastrofo: en 1723 detruis fajrego preskaŭ la tutan urbon, indulgante nur la mezepokan Matias-preĝejon (nuna Preĝejo de l' Kronado). Post tiu tempo forte evoluadis la urbo. En tiama tempo posedis Buda 22 919 loĝantojn, dum Pest havis nur 13 021. — Tiu proporcio ŝanĝiĝis baldaŭ je favoro de Pest, ĉar la tieaj universitato, juĝejo kaj aliaj institucioj bonfare influis la progreson de la maldekstra parto, malgraŭ tio, ke la vera ĉefurbo estis Buda. Tiu ĉefurbo bedaŭrinde estis senigita de l' reĝa sidejo kaj de la ĉefaj estraroj. La reĝino Maria-Teresia ja konstruigis la reĝan palacon, sed ŝi neniam uzis ĝin. Jozefo II-a (filo de Maria-Teresia) translokigis la gubernatorĉambron al Buda, sed tio jam ne kapablis utili al Buda, ĉar tiel en komerca kiel en kultura rilato fariĝis ĉiam pliforta centro la maldekstra parto: Pest. Tiu parto eĉ komencis superi Buda'n laŭ eksteraĵoj, ĉar oni tie reguligis la stratojn, eken-treprenis konstruadon ktp. La plej fervora protektanto de l' beligado estis la arkiduko Jozefo kiu, kun forta patrujamo, dediĉis sin al la tiucela laboro, kies rezulto fariĝis la bela, moderna grandurbo hodiaŭa. En la jaro 1799, Budapest havis 29 780 loĝantojn, dum en 1851 ĝi posedis jam 127 935 loĝantojn. Proporcio al tiu rapida evoluado estis la prosperado de ekonomia kaj kultura vivoj. La urbo vigle beligadis kaj riĉiĝis rilate al publikaj konstruaĵoj. En 1802 estis fondata la Nacia Muzeo, en 1830 la Akademio de Sciencoj, en 1837 la Nacia Teatro. Sekve de tiuj institucioj, Pest fariĝis vera centro de scienca, arta kaj literatura vivo hungara. Ĉi tie loĝis la grandaj verkistoj kaj poetoj hungaraj kun sia gvidanto Miĥaelo Vörösmarty.

De kiam en 1848 la regna parlamento elektis sian sidejon Pest, ĝi fariĝis efektiva centro kaj ĉefurbo de Hungarujo. En 1849 oni decidis unuigi la du urbojn Buda kaj Pest, sed tiun planon oni ne povis tuj realigi, ĉar sekvis epoko de absolutismo. Dum tempo de tiu politiko la evoluo de la urbo estis malhelpita, sed tiom pli forte ĝi prosperadis post la kompromiso de 1867. Fine en la jaro 1873 estis deklarata kaj plenumata la unuigo de ambaŭ urbopartoj. De tiu momento ekiĝis prosperado en kvazaŭ amerika rapideco, kiu rezultigis ĝian hodiaŭan belaspekton. La malfeliĉa milito estigis novan baron al plua evoluado.

SUR LA VASTA HUNGARA EBENAĴO.

En la centro de Hungarlando, oriente de Budapest, estas la vasta ebenaĵo, la Alföld. Ĝi etendiĝas proksimume 400 kilometrojn de nordo ĝis sudo, 200 kilometrojn de oriento ĝis okcidento, kaj estas la abunda grenejo de la lando. Malproksime, for sur la horizonto ĉiufanka, nenio estas videbla krom tiu absolute plata ebenaĵo senfina. Sunleviĝo kaj sunsubiro tie estas similaj al tiuj vidataj sur la maro. Kiam la ruĝa vizaĝo de la suno aperas sur la horizonto, ĝi, per unu ekrigardo, vidas la tutan panoramon, kaj diras „Bonan nokton“ kvazaŭ per unu radio. La centra parto de la Alföld estis origine vasta stepo, iam kovrita per herboj, arbustoj kaj eriko, hungare „puszta“ (pusta); sed de post kelke da jardekoj ĝia aspekto ŝanĝiĝis; paŝtejoj kaj erikejoj estas nun grenkampoj kun arboj, la arbustaro estas nun kamparaj parceloj kaj farmoj. La sabla grundo, antaŭe senfrukta, nuntempe liveras delikatan kaj bonegan tablovinon.

La maloftaj urboj kaj vilaĝoj sur la Alföld staras de 9 ĝis 15 km. unu de la alia, kaj ili estas dense loĝataj. Jam de post kelka tempo novaj loĝlokoj kaj novaj vilaĝoj aperis ĉie sur tiu ĉi vasta regiono, kaj pro intensa terkulturado la primitiva karaktero de la vasta ebenaĵo malaperas. La idilia ŝafpaŝtisto fariĝas malofta, la romantikaj ciganoj de estinteco preskaŭ malaperis.

La plej karakteriza parto de la Alföld estas la erikejo Hortobagy, apartenanta al la urbo Debrecen. Ĝia amplekso estas 28 000 hektaroj; ĝi estas virga kaj estas la malalta parto de la hungara ebenaĵo. Tiu erikejo estas la vera hungara „pusta“. Iam nek ŝirmo nek arbo estis videbla sur ĝi, kaj ankoraŭ nun estas grandegaj spacoj, kie gregoj (aroj) da ĉevaloj, brutoj kaj ŝafoj sin paŝtas. Majesta estas la vasteco kaj la silento de Hortobagy. Oni tie aŭdas nur la tintiletojn de la brutoj kaj la ŝalmojn de la paŝtistoj; nenio ĉirkaŭe — krom la senfina ebenaĵo. Tiu granda ebenaĵo havas sian poezian ĉarmon, kaj oni ne ricevas tian monotonan impreson, tiel karakterizan ĉe la malgajaj rusaj stepoj kun iliaj tombontetoj.

Sur la erikejo de Hortobagy oni vidas fenomenon, la faman „Delibab“, unikan miraĝon, belan kiel „Fata Morgana“. Je tre varma tago diversaj pejzaĝoj subite aperas sur la horizonto: jen, vasta maro da tremanta akvo, kiu intermite aperas kaj malaperas; jen, aroj da arboj, vilaĝoj, urboj, kasteloj sur marbordoj, lagoj, ventmuelejoj ktp. Nenio estis tie, estas nur vizio, kaŭzata pro la vibrado de la arda aero.

Interesa estas la vivo de la kamparanoj sur la hungara ebenaĵo. Ili estas belaspektaj, brunaj, viglaj, harditaj pro ekstremaj ŝanĝiĝoj de la klimato; ĝentilaj, prudentaj kaj honestaj, ankaŭ ĉiuj bonaj kvalitoj de la hungara nacio estas troveblaj en ili. Ili daŭrigas paŝtitan vivadon. Ili havas ankaŭ sociajn rangojn: iliaj aristokratoj estas la „Ĉikoŝ“, bonaj ĉevalrajdistoj; ĉiu povas per sia malpeza lazo lerte kapti iun ĉevalon el sia grego; poste venas la „guljaŝ“ (bovinpaŝtisto), la „juhaŝ“ (paŝtisto) kaj fine la „kondaŝ“ (porkpaŝtisto). Ili zorgas pri la brutoj sin paŝtantaj en multnombraj gregoj. La Ĉikoŝ havas lazon, ankaŭ neordinaran vipon kun tenilo ornamita per bendoj el ledo, metalfadeno kaj desegnoj el plumbo.

La maĝaroj (hungaroj) diras, ke la Alföld estas ilia vera patrolando. Tie ili vivas dense. La maĝaroj venis el Uralo-Altajo kaj estas el turka deveno. Ili ekokupis sian patrolandon ĉirkaŭ la fino de la IX-a jarcento, kiam ili okupis ĉiujn ebenaĵojn, taŭgajn por ilia vivmaniero, kaj kies fekundeco logis ilin resti. Kiam maĝaroj unue alvenis, ilia nombro estis inter 120 ĝis 200 mil animoj. Spite rabadon de tataroj, turkoj kaj aliaj malamikoj, ili rapide plimultiĝis, kaj nun ilia nombro superas dek milionojn. La maĝaro estas kombinaĵo de

das-banejo, la Császár-banejo (imperiestra banejo), la Margaret-insula banejo sur la flanko de Buda. La Széchenyi-, Gerharda kaj Lukas-banejoj estas laŭ plej moderna maniero konstruitaj, kaj la du lastaj posedas ankaŭ grandegan hotelon. La Budapeŝtajn ŝim-banejojn vizitas malsanuloj el ĉiuj anguloj de la terglobo, kaj tre multaj, kiuj alvenis en portilo aŭ apogitaj sur lambastono, foriris tute sanaj. Ĉiuj nomitaj banejoj estas facile atingeblaj, estante kunigitaj kun ĉiuj partoj de la urbo per tramoj kaj elektraj veturiloj. Komprenoble ĉevalaj veturiloj kaj aŭtofiakroj abunde staras je dispo de la publiko. Estas interese scii, ke Budapest estis la dua urbo de Eŭropo, en kiu subtera vagonaro estis konstruita. La urbo New-York malfermis la unuan subteran linion nur poste, kaj ĉe ĝia konstruado oni tre bonŝance uzis la spertojn akiritajn en Budapest. La Budapeŝta subtera vagonaro kuras sur la larĝa kaj tutrekta Andrassy-strato al la urba arbareto, la ŝatata granda amuzejo de la Budapeŝta publiko, kie estas lokigitaj la Muzeo de Belaj Artoj, la Zoologia Ĝardeno kaj aliaj vidindaĵoj.

Sur ambaŭ flankoj de la Danubo viciĝas longaj serioj da palacoj. La plej rimarkinda el ili estas la konstruaĵo de la parlamento kun sia grandega kupolo kaj gracilaj turoj. Inter la konstruaĵoj de la ĉefurbo estas sendube ĉi tiu la plej okulfrapanta. Kontraŭe de ĝi, sur la Kossuth-placo estas konstruita en pura renesanca stilo la Justeca Palaco. Antaŭ la suda flanko de la parlamento ni vidas la rajdanto-statuon de Julio Andrassy, la eminenta ŝtatviro. Inter la multnombraj statuoj kaj artmemoraĵoj estas menciindaj la statuoj de Georgo Washington, Ludoviko Kossuth, grafo Stefano Széchenyi, Francisko Deák, Aleksandro Petöfi, Johano Arany, Miĥaelo Vörösmarty. Ĉe la fino de la Andrassy-strato antaŭ la urba arbareto troviĝas la miljara memorkonstruaĵo, kun alta kolonaro kaj statuoj. En la urba arbareto estas unu el la plej belaj statuoj la „Anonymus“, kiu reprezentas la sennoman notaron de reĝo Béla. Ankaŭ sur la flanko de Buda estas kelkaj belaj statuoj, inter aliaj la Honvéd-statuo, la statuo de S-ta Gerardo, la statuo de Eugeno de Savojo. Tiu ĉi lasta rigardas el la antaŭaĵo de la Reĝa Palaco malsupren al la Danubo. Malantaŭ la Reĝa Palaco staras la belega Csikós-statuo (Ĉevalisto-statuo). La Matias-preĝejo kaj antaŭ ĝi la S-ta Stefano-statuo estas tre interesaj vidindaĵoj. Sur la Buda'a flanko de la ĉenponto, ŝnurveturilo (hungare: ŝikló) kondukas sur la tiel nomatan „fortikaĵon“.

Inter la rigardindaj vidindaĵoj de Budapest estas la Nacia Muzeo, kie multope estas amisiĝitaj antikvaj kaj modernaj artaĵoj. La Operdomo estas same bela konstruaĵo. Proksime de la Operdomo estas videbla la statuo de la fama hungara romanoverkisto Maŭro Jókai. Budapest havas multajn teatrojn, el kiuj estas menciindaj la „Vigszínház“ (Gaja teatro), la Magyar-teatro (Hungara teatro, pron. Madjar), la Király-teatro (Reĝo-teatro, pron. Kiraj), la Belvárosi-teatro (Enurba teatro, pron. Belyaroŝi), la Popolopero kaj la estinta Popolteatro, kie ludas nun la Nacia teatro. En la teatroj de la ĉefurbo oni vintre kaj somere ludas kaj la prezentadoj konkuras bonrezulte kun la teatroj de kia ajn urbo. La Nacia teatro staras apud la vojkruĉo de la Rákóczi- kaj József-stratoj (pron. Rakoci, Joĝe). La Rákóczi-strato finiĝas en vasta placo, kie estas la Orienta stacidomo, la plej grava centro de la hungarlanda fervoja trafiko. Antaŭ ĝi estas la statuo de Gabrielo Baross (pron. Baroŝ), la eminenta fervoj-konstruanta ministro.

Ĉar ni jam estas ĉe la



ANDRASSY-STRATO, LA PLEJ BELA STRATO DE BUDAPEST.

„Fraĵoj, manon donu kore!“ Budapeŝt deziras premi la vian.

Orienta stacidomo, ni turnu nin dekstren kaj iru en la Kerepeŝ-tombejon, kie ripozas la granduloj de Hungarujo. Ĉi tie estas entombigitaj Francisko Kossuth, la filo de Ludoviko Kossuth, la neforgesebla gubernatoro de Hungarujo, Francisko Deák kaj grafo Ludoviko Batthyányi. Inter la ĉi tie videblaj maŭzoleoj kaj tombomumentoj estas aro da vere kortuŝaj kaj artaj monumentoj.

Kiu Budapeŝton vizitas, ne preterlasu pririgardi la Agrikulturan Muzeon, kiu estas lokigita en belega konstruaĵo konstruita laŭ modelo de la iama fortikaĵo Vajda Hunyad. La fortikaĵo Vajda Hunyad, kune kun la apuda lago estas unu el la plej belaj vidindaĵoj de la ĉefurbo. Same estas impona arkitektura kreaĵo la grandega Baziliko en la Leopold-distrikto, kies duobla turo kaj kupolo de malproksime estas videblaj. Entute la belajoj de Budapeŝt estas tiaj, ke vere indas ekkoni ilin. Ĉiuj fremduloj, kiuj vizitis la hungaran ĉefurbon, foriras de ĝi kunportante la plejbonajn memorojn, ĉar ili partoprenis interesajn kaj valorajn travivaĵojn.

Trad. P. Gyula Lajos.

LA BASTION-PROMENEJO.

DE ERZSÉBET SIMAN.

La bastionpromenejo estas objekto de mia tute stranga, festtagsimila, malproksima kaj revenanta amo, io, kion mi tre amas, kaj kvankam mi forgesadas ĝin dum longaj monatoj, tamen, kiam la stranga hazardo tien rekondukas min, mi ĉiam denove rekonsciigas: ĝi estas ja mia Budapeŝta favorata aĵo — ĉi tiu promenejo kun siaj delikataj malgrandaj palacoj, kies pordegoj malfermiĝas al la Uri-strato, kun la ravega, malgranda strateto finiĝanta en ĝi, kiu estas tiel mallarĝa, ke oni povas, se oni etendas la brakojn, per la pintoj de la fingroj atingi la malglatajn murojn.

Bastionpromenejo. Kiel bone mi rememoras nian unuan renkontiĝon. Pasis kelkaj jaroj, de kiam mi fariĝis Budapeŝta enloĝanto; mi loĝis en la Boráros-placo kaj sidiĝis sur la ŝtuparo de la ŝiphaveno, simile al laca fabriklaboristino, simile al hometo pelita tra la vivo.

Tiutempe mi estis juneta lernanto, kiu premis siajn lernolibrojn sub la brako en mildaj aŭtunvesperoj kaj provis lerni sub la lampoj de la haveno por forgesi la neforgeseblan, karan hejmurbon en la provinco.

Iam la hazardo kondukis min sur la bastionpromenejon. Ho, kia paco, narkota stato, beleco, silento kaj pureco! Nun mi eksciis, kio estas bela en Budapeŝt: Buda, Buda kun siaj kvietaj montetoj kaj malnovmoderna stilo. Soldata muzikorkestro ludas tie ĉiudimanche, kaj amaso da homoj promenadas.

De la promenejo oni povas malsuprenrigardi en la ĉarmatan valon, transrigardi al la granda kaj malgranda Svabmontoj, en kies duminuta proksimeco estas la konfitejo malgranda, centjaraga kun sia centjara, pure konservita tradicio.

Kiu amas la silenton, la delikatan bonhumoron, amos same la bastionpromenejon, kaj nun skribante pri ĝi, mi malĝoĝiĝas: Ho, Dio, pasis preskaŭ tuta jaro, ke mi ne estis tie! Ĝi atendas min fidele, akceptas min ĉiam bonkore, se mi vizitas ĝin kaj mi — tiom malfidela estas! Sed ĉu tio ne estas la sorto de ĉiu fidela animo?

Mi konsolas min nur per tio, ke versajne nur tiaj mi amas ĝin, ke ni nur malofte renkontiĝas.

Trad. Georgo Stejner.

vigleco kaj trankvileco; li ĉiam estas sur posteno kontraŭ danĝero, sentema al eksteraj influoj, entuziasma kaj, kiam lia emocio estas vekita, li estas kapabla al grandaj faroj. Li ne ŝatas entrepreni ion, kio ne certe finiĝos sukcese. En ĉiuj entreprenoj li montras admirindan viklecon.

Maĝaro de pura raso estas ja nobla ulo: li estas sincera, prudenta, honesta kaj samtempe fiero; li amas sian patrolandon pli ol ion ajn en la mondo, li estas brava, kuraĝa, gastema kaj sindona. Liaj pensoj estas simplaj, lia logiko estas klara. Li estas morala kaj pia, aŭskultas al la opinioj de aliaj kaj estas tolerema al religio de aliaj. Li estas sufiĉe edukita kaj povas sekvi ĉiajn metiojn; estas en komerco, kie li estas malforta. Aliflanke, li havas grandan artistan guston kaj talenton; la hungara poezio kaj muziko ĉie estas ŝatataj. Multaj kamparaj distriktoj produktas bonegajn brodaĵojn, delikatajn drapojn, kaj la kostumoj en vilaĝoj estas tre originalaj. Nur malgranda parto de la nacio vivas en urboj, la pli granda parto loĝas en vilaĝoj. La vera tipo de maĝara loĝejo estas la karaktera „tanja“ sur la granda hungara ebenaĵo. Ĝi estas malgranda kampara domo kun pajla tegmento kaj blanke kalkitaj muroj meze de kampo, kaj estas la propraĵo de parcelhavanto. La plimulto el ĉi tiuj „tanja“ estas okupataj nur dum la agrikultura sezono. Antaŭ ĉiu dometo estas beleta florgardeno. La dometo konsistas el du ĉambroj, la antaŭa

LA EKONOMIA ROLO DE HUNGARLANDO INTER ORIENTO KAJ OKCIDENTO.

D-ro Emil Stein faris tre valoran prelegon en la Cobden-Asocio pri la ekonomia rolo de Hungarlando. Li komencis ĝin per la demando, ĉu Hungarlando estas vere Oriento aŭ ne. Kvankam nenio kondamninda estus en tio, se ni estus orienta ŝtato — la deveno de la hungara nacio ja rekondukas en Orienton same kiel ĉe multaj aliaj kulturaj popoloj —, tamen la okcidenteŭropa publika opinio ne envicigas nin inter la orientajn naciojn. Ni estas la lasta defendejo de Okcidenta Eŭropo, ili kutimas esprimi, kaj tion pravigas la sinsekvo de nia nacia historio.

La okcidentaj, precipe amerikaj kaj anglaj financaj rondoj ĉiam montradis ian retenon rilate al partopreno en la ekonomia vivo de la balkanaj ŝtatoj, kaj la okcidenteŭropa kapitalo enmiksiĝis nur en tiajn balkanajn entreprenojn, kiujn inciativis aŭstria aŭ hungaraj bankoj ĝisfunde konantaj la tieajn cirkonstancojn.

Vere kun la kapitalpartopreno kaj kunlaboro de hungaraj bankoj



LA ELIZABETA PONTO.

por la uzado de gastoj kaj la posta rezervita por la familio; ankaŭ ĝi havas koridorojn kaj kuirejon. La antaŭa ĉambro estas la plej bona parto de la domo, tie oni vidas grandan liton, sur kiu kuŝas kuŝenoj preskaŭ ĝis la plafono. Antaŭ la fajrujo estas benko kaj tablo. Sur la komodo staras spegulo, kelke da kolorigitaj glasoj, tasoj ktp. La meblaro de la pli riĉaj familioj estas pentritaj blue kun gajaj desegnoj de rozoj, tulipoj, girlando k.

En ĉi tiuj dometoj la loĝantoj estas tre industriaj. Ili fabrikas brodaĵojn en silko kaj oro, ĉizitajn vipojn, strangajn tabako-poŝojn, lignajn akvobotelojn, kovritajn per ĉevala felo.

En la „tanja“ de la Alfold la naciaj kostumoj ankoraŭ regas en sia originala stilo kaj formo. Somere la kamparanoj portas blankan ĉemizon kunte larĝaj flirtantaj manikoj, larĝan pantalonon el blanka lino, veŝton ornamitan per malgrandaj arĝentaj butonoj, kaj malgrandan rondan ĉapelon el felto. Iliaj grandaj manteloj el lano kaj pelerino estas rezervataj por dimanĉoj kaj specialaj okazoj. La pelerino estas farita el pecoj de ledo diverskolora. La manteloj el maldelikata blanka drapo, kelkfoje nigra, kun grandaj manikoj, fermitaj ĉe la malsupro kaj uzataj por poŝoj, estas multe broditaj per fadenoj helkoloraj. La virinoj portas multajn juvojn unu super la alia, longajn ĝis la maleolo, ankaŭ specon de veŝto, korsajo, ŝuon kun miksitaj koloroj kaj broditajn pantoflojn egale tre allogajn.

En la vilaĝo Mezökövesd vojaĝanto ankoraŭ trovas la plej originalajn kostumojn kies riĉeco de koloroj ne povas esti superata. La rigardanto estas ĉarmata per la bela vidaĵo dum bela dimanĉa mateno, kiam la kamparanoj iras al la preĝejo sub la suno brilanta sur ĉi tiun amason da koloroj, rubandoj kaj brodaĵoj en silko, oro kaj arĝento.

La vojaĝanto ricevas multe da unikaj impresoj sur la Granda Hungara Ebenaĵo kaj havas maloftan okazon studi originalan kaj primitivan vivadon, jam preskaŭ malaperintan ĉi la eŭropaj landoj.

estiĝis novaj industriaj entreprenoj en la Balkan-ŝtatoj, kaj multaj el la balkanlandaj financinstitutoj, industriaj kaj komercaj firmoj dankas sian vivon kaj evoluon al la spirito kaj kunhelpo de la hungara laboro.

La mondmilito, la revolucioj kaj postmilitaj okazintaĵoj derompis la eksterlandajn interrilatojn de la hungara komerco jen en Okcidento jen en Oriento. Sekve de la malfacilaĵoj en la fervoja kaj ŝipa trafiko, en la landlima dogana trafiko, kaj sekve de la limigado en la devizinterilato la lando preskaŭ tute eltriĝis dum longaj jaroj el la internaciaj, precipe transitkomercaj interligoj, kiujn ĝi kreadis pli frue per granda penado kaj oferoj.

Se iu popolo volas kontentigi siajn per la evoluo de la kulturo kunligitajn luksajn necesojn, ĝi povas tion nur fari, se ĝi havas la eblecon levi sian industrion al la grado de la eksportkapableco kaj plibonigi la aktivaĵojn de sia bilanco per interŝovo en la internacian komeron. En Hungarlando por ĉiuj ĉi tie menciitaj aferoj vere ekzistas la premisoj.

La agrikulturo ne povas anigi novajn laborfortojn al si, ĉar la agrikultura produktado estas okupado ligita al la laborloko. La industria produkto same ne taŭgas por solvi la demandon, ĉar kiel ajn bele kelkaj industribranĉoj post la mondmilito disvolviĝas, tamen iliaj terenoj estas limigitaj per la enlanda konsumado. Tiel restas nur la komerco kiel helpanta defluilo kaj nur la eksterlanda komerco, kiu sole estas evolukapabla kaj sola tereno, sur kiu la grandaj problemoj estas solveblaj. Oni mencias nur la revizion de la komercaj kontraktoj, la reguligon per reciproka kompreno de la transittrafikaj fervojaj tarifoj, la eliminadon de la malfacilaĵoj ĉe la doganaferoj kaj ĉe la pasportakiroj, kiuj taŭgas por antaŭenpuŝi la aferon de nia eksterlanda komerco.

Se oni atingus baldaŭ la aluditajn facilaĵojn, Hungarujo povus fariĝi vera ponto inter Oriento kaj Okcidento.

Tuj aliĝu la 21-an Mondieston! Vi servos vin kaj nian movadon.

LA HUNGARA LITERATURO.

Verkis Elemér Halmay jun.

Ankaŭ la miljaraĝa hungara popolo havas sian fabelaron kaj siajn legendojn, en kiuj reviviĝas la ombrobildoj de longe pasintaj jarcentoj. La hungara popolo aliĝis al la okcidenta kulturo nur kune kun Sankta Stefano kiu, akceptinte la kristanan religion, konvertis la idolanajn hungarojn al kristaneco kaj gajnis per tio la kronon de reĝo kaj la titolon de apostolo. Grandaj bataloj sekvis la regadon de nia unua granda reĝo, kies memoron eternigas la bronza rajdanto-statuo sur la fortikaĵo en Buda. La kavalira hungara nacio batalis ankaŭ por fremdaj, ne ĝuste hungaraj celoj (kruc-militoj) — kaj en la plenumo de sia historia destino ĝi fariĝis la rekonata ŝirmilo de la okcidenta civilizacio.

Tiuj krudaj jarcentoj estis ankaŭ en la landoj, kiujn la feliĉo pli favoris ol nin, malfavoraj al la muzoj kaj sciencoj, sed eĉ tiam ni havis skribsciencojn, kiuj notis la sangajn okazintaĵojn sur mal-dikan pergamenon en kronologia vico.

En la unuaj jarcentoj ne okazis multo da notinda en la literaturo, sed jam komence de la 15-a jarcento, kiam la konturo de la okcidenta kulturo komencis ankaŭ ĉe ni fariĝi konata, sekvis sin la dikaj analoj en rapida vico. Pastroj kaj monaĥoj sidis kurbite en siaj haraj kapuĉoj sub la gotikaj fenestraj arkoj de la monaĥejoj, kopiante valorajn skribaĵojn. Sed oni laboris diligente ne nur en tiuj sanktaj haloj; ankaŭ en la tendaroj aperis kántistoj, fabelrakontistoj kaj bardoj, kiuj prikantis la glorajn farojn de la herooj, kaj amuzis la kavalirojn ĉe festenoj per rakontado de famaj legendoj. Ili esploris la historion kaj sciis interesigi la drinkantajn kavalirojn per sia brila fantazio kaj pensaro.

La renesanco de la hungara nacia kulturo havis sian briltempon sub la regado de Matiaso Corvinus. Reĝo Matiaso ekonis la signifon de la scienco; en lia kortego restadis la plej bonaj kuracistoj, astrologoj, alĥemiistoj kaj filozofoj de la tiam tempo.

La manuskript-kolekto Corvina estas la unua kolekto de la hungara enciklopedio. Bedaŭrinde multaj el la volumoj perdiĝis dum la turka subprema epoko. Tamen restis kelkaj arĝentumitaj patinkovritaj volumoj.

Trairante de jarcentoj al jarcentoj la historion de la hungara nacio ni vidas, ke ĝi estas trateksita de ĉiam pli gravaj katastrofoj signantaj ĝiajn ĉapitrojn simile al limfostoj. La tataro invado . . . La turka subpremo daŭranta unu jarcenton kaj duonan . . . La liberecbataloj kontraŭ la dinastio antaŭ kaj post Rákoczi . . . Poste la grandioza liberecbatalo en la jaro 1848, en kiu elfluis la sango de tiel multaj herooj kaj martiroj . . . Kaj fine la paco de Trianon!

La kaŭzo de la inklinado al la malĝoja kaj melankolia karaktero de la hungaraj literaturo, muziko kaj arto estas konsekvenco de tiuj tragedioj; eĉ meze de gajega amuzo funebras la hungara animo . . .

Al tri apostoloj povas danki la hungara renesanco la gigantan inciton, kiu ekskuis la „maldiligentan“ hungaron el lia letargio: al Kossuth, Deák kaj Széchenyi. El la influo de tiuj spiritgrandeguloj devenis la riĉa literaturo, la spirita produktado de la dua duono de l' pasinta jarcento.

Hodiaŭ, kiam nia patrujo estas kripl-

igita, ni krias al la mondo la vortojn de Széchenyi: „Hungarujo ne estis, sed estos!“ Ni ne malesperu, ni ne havas kaŭzon por tio, ni nur kredu, ke per forta volo kaj energio oni povas atingi ĉion! Oni ne povas forpreni nian spiritan vivon, nian kulturon, kiu ofte brilis kiel torĉo en la nebuloj de Eŭropo.

En la mezo de la pasinta jarcento ekaperis blindigaj kometoj sur la hungara horizonto — la hungaraj klasikuloj. Kelkaj nomoj el ili: Madách, Petöfi, Vörösmarty, Aranyi, Jókai, Eötvös. Tiuj eminentaj reprezentantoj de la hungara literaturo estas konataj en la eksterlando same kiel ĉe ni. Madách akiris gloron per sia verko „Tragedio de l' homo“ (esperantigita de D-ro K. de Kalocsay). Ni povas fiere konstati, ke tiu lia kreaĵo inde alviciĝas al „Faŭsto“ de Goethe kaj „Hamleto“ de Shakespeare.

En la 70-aj jaroj estis multaj el niaj verkistoj influitaj de la franca naturalismo. Ĉi tiu naturalismo produktis grandiozaĵojn. La spirita amikeco teksis ĉirkaŭ ambaŭ nacioj idealan ligilon, kaj ia publiko akceptis afable la diversajn romanojn kaj novelojn. Al tiu pionira generacio verkista apartenas Paŭlo Gyulai, Karlo Szász, Jozefo Lévy kaj la antaŭ nelonge mortinta Eugenio Rákosi. El tiu generacio devenas la famaj verkistoj de la popolromanoj, rakontanta poezio: Kolomano Mikszáth, Aleksandro Baksay, Géza Gárdonyi, Stefano Tömörkényi, Alekseo Benedek, la kreinto kaj majstro de la hungara felietono: Adolfo Agai, Aleksandro Bródy; en pli nova tempo: Jozefo Bartóky, Julio Krúdy, Sigmondo Moricz.

La noveloj estis multe influitaj de la francoj, precipe la majstro-novelisto Maupassant estis kiel duondio estimata, kaj multaj belaj noveloj hungaraj portas lian postsignon. La temoj estas tre diversaj. Kelkaj priskribas la vivon de la provinc-aristokratoj per pompaj paŝtelkoloroj, aliaj analizas la vilaĝan animon laŭ realeca maniero, kaj denove aliaj okupas sin pri la diversaj sociaj tipoj.

Inter la reprezentantoj de tiu direkto estas ankoraŭ hodiaŭ Franco Herceĝo la plej fama. Similajn temojn pritraktas kaj proksime al liaj ideoj staras: Franco Molnár, Stefano Szomaházy, Alfredo Drasche-Lázár, Stefano Bársony, Zoltano Ambrus, Karlo Szász, Julio Szini, Eugenio Heltai kaj Ladislao Lakatos. Oni rimarkas grandan francan influon en la verkoj de Dezidero Szomorj, dum oni trovas postesignojn de Jókai en la libroj de Nikolao Suranyi. La romanoj de Dezidero Szabó estas kreaĵoj de pratalento ofte ekstremitanta.

Krom la liriko, ankaŭ baladaj kaj legendaj poetoj laŭtigas, kaj eĉ la artistoj de la pesimismo anoncas sin kaj novaj direktoj estas videblaj. Je la fino de la 90-aj jaroj ekestis revolucio, novaj vortoj ekonis kaj fajre stimulis la legantaron. Partioj formiĝis por kaj kontraŭ, kaj komenciĝis batalo inter „malnovuloj“ kaj „novuloj“.

Niaj poetoj paŝadas ankoraŭ en la postesignoj de Johano Aranyi, sed jam ekaperis verkistoj sin okupantaj en siaj poemoj pri internaciaj ideoj, ilin jen glorigante, jen kondamnante. Al ĉi tiuj apartenas: Julio Reviczky, Alekseo Endrödy, Emilo Abrányi, Jozefo Kiss, kaj

la ankaŭ hodiaŭ agantaj poetoj: Andoro Kozma, Ludoviko Palágyi kaj Henriko Lenkei.

Komence de la 90-aj jaroj ekaperis Andoro Ady, kiu baldaŭ havis grandan sekvantaron. Ady estas eminenta poeto-geniulo.

Inter tiuj, kiuj skribis lian nomon sur siajn standardojn — ili estas la membroj de la ĵurnalo „Nyugat“ (Okcidento), — estas multaj valoraj individuoj, i. a. Miĥaelo Babits, Erneste Osváth, Aladaro Schöpflin, Dezidero Kosztolányi, Erneste Szép, Makso Fenyő, Adalberto Révész, Géza Szilágyi, Frederiko Karinthy, Arpado Pásztor, Miĥaelo Földi.

Fine el niaj verkistinoj estas notindaj: Grafinoj Aleksandro Teleky (Szikra) kaj Margit Bethlen; Renée Erdős, Margit Vészi, Laura Daniel Lengyel kaj Cecilie Tormay.

Dum tiu evoluo de la hungara literaturo kuntiriĝis malhelaj nuboj sur la horizonto de la maljuna Eŭropo: aperis la fajroruĝa fantomo, la milito, parolis la kanonoj kaj devis silenti la literaturo. En ĉies koro tremis la maltrankvilega demando: „Kio okazos?“ . . . En la somero 1914 kvazaŭ tombe-aero blovis tra la funebraj nacioj.

La scienca literaturo multe ampleksiĝis dum la lastaj jardekoj. Enciklopedioj, verkoj literatur-historiaj, filozofiaj, geografiaj, juraj, filologiaj, astronomiaj kaj medicinaj aperis abunde. Ankaŭ leksikonoj estas eldonitaj, kaj ili trovas ĉiam pli da interesuloj.

La beletristika kaj scienca literaturo

MUZIK-KULTURO EN HUNGARUJO.

Verkis D-ro Nikolao Várady.

La historio de la hungara popolo ne estas alia ol longa ĉeno de bataloj por sendependeco kaj liberiĝo el fremda subpremo. Dum la evoluo de okcidentaj nacioj fluis en relative kvietan fluon, la tragika historia sorto, kiu destinis Hun-

„Harmonia coelestis“ de duko P. Eszterházy el la jaro 1711.

Precipa parto de la hungara muziko estas la kruckantoj, kiuj same naskiĝis el bataloj. La interpretistoj de tiu muziko estas depost Rákoczi la ciganoj. Ĉirkaŭ la jaro 1735 estis Cinka Pana, laŭdire la komponinto de la Rákoczi-marŝo, bone konata. La tre talentaj artistoj de la varbkantoj kaj de la malrapida hungara Palotás-danckantoj estas Bihari, Lavotta, Csermák.

En la 18-a jarcento posedis multaj hungaraj magnatoj propran orkestron, en kiu trovis okupadon plejparte eksterlandaj artistoj. Tiamaniere pasigis Jozefo Haydn dudek jarojn ĉe la duko Eszterházy en Eszterháza. Schubert restadis en Zeléz ĉe grafa familio de Eszterházy ktp. Komence de la 19-a jarcento ekvekiĝis la artmuziko ankaŭ en la burĝa societo al memstara vivo; ĝis tiam ĝi estis kulturita nur en la rondo de kelkaj muzikamantaj magnataj familioj. Ni vidas tie jam hungarajn kvodlibreteldonojn. En 1812 oni malfermas la „Pestnan Teatron“, kaj okaze de tio Beethoven komponis sian Reĝo-Stefano-uverturon. Fine oni prezentis en 1823 en la teatro de Kolozsvár la unuan hungaran operon de Jozefo Ruzitska: „La forkuro de reĝo Adalberto“. En la jaro 1837 oni malfermis la „Nacian Teatron“, kie oni ludis ankaŭ operojn. La nomo Franco Erkel, tiu grandioza, super la nivelo de sia tempo staranta kaj eminenta homo en la historio de nia muzik-dramo, aperis en la jaro 1840 unuafoje sur la programo. Krom produktoriĉa (naŭ operoj), li estis samtempe la unua kreinto de la hungara muzikkulturo kaj ĝia plej fervora pioniro. Apud li agis je la operliteraturo: Andoro Bartay, Franco Doppler (Ilka), Georgo Császár kaj Karlo Thern. La tre talenta Miĥaelo Mosonyi verkis simfonion (Szép Ilonka) kaj preĝejan muzikon (tri mesojn kaj hungarajn kantatojn).

Grandioza, genia artisto ne nur de la hungara, sed ankaŭ de la ĝenerala muzikhistorio estas Franco Liszt, kiu antaŭiris sian tempon kaj kies universala individueco nur en kelkaj direktoj estis ĉe ni ekkonata kaj uzata de liaj samtempuloj kaj posteuloj. Liszt estis aŭdaca reformatoro de la simfonia muziko; liaj ideoj pri instrumentado estas uzitaj de Wagner. La influo de la hungara tendenco en la komponaĵoj de Liszt estas videblaj ĉe Emerico Székely, Arpado Szendy, Aladaro Juhász, Franco Gaal, Karlo Aggházy kaj Julio Major; al lia plej bona posteularo apartenas la fama muzikisto Attila Horváth. El lia pedagoga agado devenas liaj plej sukcesaj lernantoj: Stefano Thoman, Bartók, Dohnányi kaj Buttykay. Plue, Liszt



Monumento de S-ta Gerardo.

de l' eksterlando estas ĉe ni brile reprezentata kaj multe legata.

La ŝipo de l' hungareco vojaĝis pli ol unufoje sur nebuloj maroj, sed ĉiam troviĝis direktistilo, kiu sciis per firma mano direkti tiun ŝipon el mardezertoj kaj nebuloj tra rifoj al la ŝirmanta, hela bordo. La espero vivas en ni, ke eble el unu ŝipo de la mond-literaturo elflugetos la kolombo, kiu fine alportos al ni la veran animpacon, kiun la tuta Eŭropo sopiradas. Trad. Irma Lederer.




Statuo de Grafo Andrásy.

garujon de jarcentoj kiel gardanton de la kulturo, barikadis la limojn de Hungarujo tra longaj periodoj, kaj la floranta konstruaĵo de ĝia kulturo estis ĉiam denove premita kaj tiritita en polvon. La vortoj de Madách: „La retorto estas dispecigita, mi povas nun denove komenci la grandan verkon“, karakterizas tre ĝuste nian historion, ĝi eĉ estas uzebla ankoraŭ hodiaŭ.

Ni travivas la plej malgajajn tagojn de la hungara historio; granda parto de nia teritorio estas sub fremda estro, sed ĝuste nun disvastiĝas nia muzikkulturo en perfekta sendependa gloro, nia kreoforto kondukas nin al gvidanta rolo en Eŭropo. Ĉiutage ni aŭdas pri sukcesoj de hungaraj koncertistoj, hungaraj ĉefoj de orkestroj en la plej gravaj centroj de l' eksterlando, kaj okaze de internaciaj kant-konkursoj hungaraj artistoj rikoltis la palmon.

En la 16-a jarcento floris ĉe ni la arto de bardoj. La kanto de la bardo Sebastiano Tinód konsistas el historioj pri militokazaĵoj enhavantaj mallongajn monotonajn kantojn, en kiuj montriĝas preĝejan influo. Ankaŭ ĉe fremdlandaj kolektaĵoj ni povas konstati signojn de hungara bardliteraturo. Inter ili estas la plej eminentaj: Heckel, Schmid, Paix, Pichi, Poglietti. El tiu tempo restis al ni multaj preĝeja kantlibroj, sed el la arta preĝeja muziko restis nur una verko:



Fortikaĵo Vajda Hunyad.

multe helpis popularigi la verkojn de Wagner en Hungarujo. Wagner ekzercis nekontraŭstareblan influon sur niaj muzikverkistoj, sed same kiel en eksterlando formiĝis ankaŭ ĉe ni paralela al la skolo de Wagner — skolo de Brahms. Tre konataj muzikverkistoj estas: Edmondo Mihalovics (La Niksoj, Toldi), grafo Géza Zichy (Nemo), Edmondo Farkas (La Pentofarantoj), Karlo Szabados (Vivra), Aleksandro Szegő (Elizabeto Báthori), Adalberto Szabados kaj Arpado Szendy (Maria), Aleksandro Rékai (La Ciganoj de Nagyida) kaj Eŭgeno Hubay. El la dek operoj de la lasta elstaras precipe la melodioriča „Violonisto de Cremona“ kaj la moderna operverko „Anna Karenina“. Karlo Goldmark (Sakuntala-uverturo, Reĝino de Saba), kiu ankaŭ devenas el Hungarujo, pasigis la plej grandan parton de sia vivo en eksterlando; liajn majstroverkojn oni eĉ hodiaŭ ludas ĉie; Roberto Volkmann, profesoro de la muzikakademio; lia posteulo estis Johano Koeszler. Fama estas lia verko: „La Silvestronoktaj Sonoriloj“ kaj multaj horoj. En la simfonia muziko havis grandan sukceson per simpla, distingita stilo: Akos Buttykay, Ladislao Toldy, Tiboro Kazacsay, Leono Weiner, kiu akiris kun sia kordkvarteto n-ro du la Coolidge-premion, Nik. Radnai, Aladaro Radó, Rudolfo Lavotta, Géza Perényi, Roberto Meszlényi, Ervino Lendvai, Stefano Kardos kaj Alberto Siklos.

El la pli novaj operverkistoj ni mencias la sekvantajn: Ernesto Dohnányi (La Turo de la Vojevodo), Adalberto Bartók (La Kastelo de la Princo Blubarbulo), Zoltano Kodály (Johano Hány), Emilo Abrányi (Monna Vanna), Mihaelo Nádor, Stefano Gajári, Eŭgeno Nádor kaj Aladaro Rado. Baletojn kaj pantomimojn komponis: Stefano Kerner (La Ferviro), Eduardo Poldini (Nordbrilo), Raulo Mader (Malvéto), Dohnányi (La Vualo de Pierette), Bartók (La Lignoskulptita Reĝido; La Mírinda Mandareno), Radnai (La Naskiĝtago de la Infantino), Siklós (La Spiegulo), Gajári (Princo Argyrus) kaj Georgo Kósa (La terna magica).

Eduardo Poldini, kies bonhumora opero (Karnevala Geedziĝo) havas de jaroj grandan sukceson, havas riĉtaltentan fantazion.

En la lastaj jardekoj, Ernesto de Dohnányi fariĝis la centra punkto de la hungara muzikvivo. Li ŝovas denove en la antaŭajn la senkondiĉan suverencon de la absoluta muziko. Liaj ĉefverkoj estas: D-mol Simfonio, multaj svitoj, sonatoj kaj variaĵoj de infankantoj.

Zoltano Kodály estas unuavice lirik-artisto. Li estas la samgenia komponisto de la poemoj de Kólcsey, Berzenyi kaj Ady. En siaj pompaj verkoj kunigiĝas formo kaj enhavo je klasika kompleksa. La komponaĵo de Psalmus Hungaricus laŭ la 55-a psalmteksto, kiun verkis Mihaelo Végh en la jaro 1561, estas unu el la plej eminentaj kreaĵoj de la tuta muzikliteraturo. Krom tiu kreaĵo, signifianta la apoteozon de lia ĝisnuna verkaro, estu menciata lia „Kanto kaj Duo por violono kaj violonĉelo“, „Malfruigitaj melodioj“, du kordkvartetoj kaj liaj fortepian-verkoj.

La ritmiko de Bartók malfermas senfinajn perspektivojn. Kiel la instrumenta muziko de Beethoven, same tiel ankaŭ tiu de Bartók estas nur simbolo, sanga batalo por konkero de transcendantaj regionoj (Burleskoj, svitoj, du portretoj, du kordkvartetoj, du violonsonatoj). Liajn popolkantaj komponaĵojn karakterizas origina, vilaĝana krudeco. Lia orkestra instrumentado estas nepre speciala, en liaj rimedoj li estas neelĉerpebla. La konturoj de lia individueco nuntempe ne estas elmezureblaj.

El la novaj junaj komponistoj estu menciataj: Georgo Kósa (Homo kaj Universo, Malnova Bildo, fortepian-verkoj), Aleksandro Jemnitz (kammermuzik-verkoj, kantoj), Zoltano Székely, Ludoviko Kentner kaj Hermano Pál.

El la operet-komponistoj ni nomas: Akos Buttykay, Eŭgeno Huszka, Viktoro Jacobi, Pankracio Kacsóh, Emeriko Kálmán, Franco Lehár, Adalberto Szabados, Alberto Szirmai, Mihaelo Nádor, Eŭgeno Stojanovits, Sigmundo Vince, Adalberto Zerkovitz; el popularaj kantverkistoj: Lorando Frater kaj Arpado Balázs.

Rilate la muzikinstruadon ni antaŭ ĉio mencias la Muzikakademion de Liszt, kiu antaŭ nelonge festis sian 50-jaran

jubileon. La pensiita direktoro de la Akademio, Eŭgeno Hubay, estas mondfama muzikpedagogo kaj edukis gardistaron de hungaraj violonvirtuozoj.

Alia ĉeffaktoro de la hungara muzik-kulturo estas la hungara Opero, kiu havas siajn prezentadojn de 1884 en sia propra majesta palaco. La direktoroj kaj muzikgvidantoj estis Franco kaj Aleksandro Erkel, Richter, Mahler, Nikisch, Kerner. Nuntempe estas Radnai komisiita por la gvidado de la Opero.

La Filharmonia Societo estas fondita de Franco Erkel en la jaro 1853. La unua posteulo de Erkel estis Stefano Kerner, kiu de 1900 havigis multajn ne-

la Budapestan kaj Hungaran Virinblovkvartetojn.

Gravan rolon ludas en nia muzikkulturo la muziksocietoj en Budapeŝto, la Palestrina-horo (Arturo Harmath), la Ĉefurba Kantad-horo (Viktoro Karvaly), la Kantad- kaj Muzikfior-societo (Emilo Lichtenberg), la Madrigal-horo (Johano Hammerschlag), la Universitata horo (Eŭgeno Kereszthy) kaj la Ĉefurba Muzikhoru (Dezidero Bár).

Potencaj energioj troviĝas en la tero de la hungara muzikkulturo. La tasko de la estanteco estas alporti ilin al la supro de ĝia evoluo. Estas necese, ke la muzikaferoj elpaŝu el sia izoleco kaj

aŭgusto. La alveturo al Budapeŝto devas okazi plej malfrue la 3-an de aŭgusto, la reveturo plej frue la 8-an de aŭgusto.

4. Bela ŝipekskurso. — La LKK preparis por unu tago de la kongreso — kiu do estos libera tago — tuttagon ŝipekskurson sur la Danubo al la bela valo kaj kastelruinoj de Višegrad. Ĝi estas unu el la plej belaj pejzaĝoj de l' nuna Hungarujo, nepre vizitinda eĉ por tiuj, kiuj pasas ĝin — jam vespere — venante el Wien per ŝipo. La ŝipveturo kostas tien kaj reen sur bela kaj granda riverŝipo, komforta kaj agrabla, po persono P. 3.50. Unuaranga tagmanĝo estas havebla sur la ŝipo en la restoracia ĉambrego; ĝi konsistas el: supo, antaŭmanĝo, rostaĵo, legomo, farunaĵo aŭ fromaĝo aŭ fruktoj, por P. 3.50 kun trinkmono. Kiu intencas partopreni la ekskurson kaj tagmanĝon, bonvolu jam nun anonci sin, por ke ni povu prepari la ekskurson.

5. Rabato sur italaj fervojoj. — La vojaĝantoj tra Italujo, se ili partoprenas la 14-an Italan Esperanto-Kongreson, ricevas rabaton sur la itala fervojo. Por detaloj turnu vin al: Grupo Esperantista Udinese, Via Beato O. da Pordenone I, Udine, Italujo. —

6. Viena Antaŭkongreso. — Por atingi fervojan rabaton tra Aŭstrio kaj senpagan aŭstran vizon, ni rekomendas aliĝon al la Viena Antaŭkongreso. Detalojn petu de tie: Wien I, Annagasse 5.

7. Fervojoj prezoj el la pligravaj lokoj al Budapeŝto. Vidu malsupre.

8. Fakkunsidoj. — La LKK starigis ĝis nun fakkunvenajn sekciojn kaj petas, ke oni en ĉiuj koncernaj aferoj turnu sin al la gvidanto de la fako. Bonvolu nepre sciigi kiajn fakojn vi deziras viziti, por ke ni certigu lokon por la fakkunsidoj.

Abstinenculoj: Gvidanto Alfio Svomalama, Koniutsa, Finnlando.

Aŭtomobilistoj: Gvidanto Karl Knoll, Zittau, Th. Körnerstrasse 11.

Bahaanoj: Gvidantino Miss Marta Root, Berlin, (Care of American Consul).

Bankfako: Gvidanto Ferenczy Pál, prokuristo de Komerca Banko, Budapeŝto V, Tisza István utca 2.

Blinduloj: Gvidanto D-ro Bánó Miklós, Budapeŝto VII, Erzsébet körút 16.

Fervojistoj: Gvidanto Löbl Emil, Budapeŝto, Direkcio de la DSA fervojo.

Filatelistoj: Gvidanto Szász Béla, Budapeŝto V, Margit körút 52.

Kristana Esp. Ligo: Gvidanto Paul Hübner, Quedlinburg, Pökenstrasse 4.

Kuracistoj: Gvidanto D-ro Mezei Károly, Budapeŝto VI, Király utca 54.

Kontraŭmilita movado: Gvidantino Annie Firth Marsh, Huddersfield.

Oomoto: Gvidanto Koogecu Nišimura, Paris, 124, Rue de la Pompe.

Pacifistoj: Gvidanto Prof. Paul Christaller, Stuttgart, Neue Weinsteige 61.


Poŝto, Telegrafio, Radio (ILEPTO): Gvidanto Zöldy István, Budapeŝto IX, Ernő utca 15.

Rotarianoj: Gvidanto Konsul v. Frenkell, Dresden, Waisenhausstrasse 20.

Scienculoj (ISA): Gvidanto Rollet de l'Isle, Paris, 35, Rue Somerard.

Stenografio: Gvidanto Kovách Tédor, Rakosszentmihály, Farkas Ign. u. 5/a.

Studentoj: Gvidanto Puskás István, Pest-szentlőrincz, Bókai Arp. u. 78.



Preĝejo de l' Kronado.

forgeseblajn muziktravivaĵojn al la koncertpubliko. El tiu societo ekestis la Kamermuzik-orkestro (Vilhelmo Komor) kaj la Blov-ensembloj (Ludoviko Dömötör). Ni mencias el la Kamermuziksocieto la Waldbauer-, Lehner-, Melbes-,

enmarŝu en la rondon de la spirita hungara vivo kaj estu starigotaj al tiu loko, kiun meritas la muziko laŭ sia granda signifo inter la artoj, en la haloj de la scienco kaj en la socia vivo.

Trad. Irma Lederer.



Informa Bulteno N-ro 5.

1. Alvoko al la societoj, grupoj, karavanestroj ktp. — La LKK ricevis jam multajn sciigojn pri opaj kaj karavanaj vojaĝoj al la kongreso, sed relative nur tre malmultajn aliĝojn kun pago. Ĉar estas tute neeble prepari eĉikan kongreson, nesciante proksimume kiom da partoprenantoj estos kaj ne havante jam certan monan bazon, ni insiste petas ĉiujn, propagandu por la kongreso, instigu la membrojn tuj aliĝi kaj pagi. La karavanestroj bonvolu tuj anonci ĉiujn pagintojn kaj sendi al ni la kotizojn. La LKK jam de tri kvaronjaroj pene laboras kaj esperas, ke la tutmonda esperantistaro same faros sian devon por sukcesigi la kongreson meze de malgrandaj ŝtatoj en Sudorienta Eŭropo.

2. Nova karavano. Por finoj kaj estonoj aranĝas karavanvojaĝon s-ro Hugo Salokannel, prez. de l' Esp. Asocio Salminen, Finnlando. Pri la aliaj karavaĵoj vidu la adresojn en Bulteno N-ro 4. En ĉiuj aferoj rilate la karavanojn interrilatu rekte kun ties estroj!

3. Rabato de la ŝipkompanioj. — La danubaj ŝipkompanioj „Hungara River- kaj Marnaviga A.S.“ kaj la „Danuba Vaporŝipnaviga A.S.“ donas al ĉiuj, kiuj posedas la provizoran kongreskarton de la XXI-a, 50% rabaton ire kaj revene. La unua vojaĝo: de Wien aŭ de Mohács ĝis Budapeŝto kaj reen sur ĉiuj poŝt- kaj personŝipoj. Dua vojaĝo: sur aparta rapidŝipo inter Wien kaj Giurgiu la rabato estos tiamaniera, ke la aĉetota kaj plene pagota bileto por

„val-veturo“ (val-veturo laŭ la riverfluo, supren-veturo estas iom pli kara) validos ankaŭ por la supren-vojaĝo. Tiu rabato validos de la 25-a de julio ĝis la 16-a de

De:	tra:	Pengö II. klaso	Pengö III. klaso
Amsterdam	Passau	163.30	103.30
Athen	Beograd	144.50	84.—
Barcelona	Postumia	184.40	117.50
Beograd	Kelebia	37.30	25.80
Berlin	Praha	83.80	54.80
Bern	Buchs	137.40	83.80
Bremen	Berlin—Praha	114.30	74.—
Bruxelles	Passau	155.10	95.30
Bucaresti	Lökösháza	62.80	40.90
Fiume	Gyékényes	61.30	41.10
Genève	Zürich—Buchs	148.80	91.80
Haag	Passau	164.60	104.50
Hamburg	Praha	109.70	70.60
Helsinki	Tallinn—Riga—Warszawa	157.— (I.)	106.70 (II.)
London	Ostende—Passau	211.50 (I.)	130.20 (II.)
Milano	Postumia	99.50	63.60
München	Salzburg	92.70	56.10
Nizza	Postumia	121.60	77.—
Oslo	Berlin	228.10	149.50
Paris	Basel	171.50	106.80
Praha	Komárom	41.—	28.30
Roma	Postumia	121.—	75.60
Sofia	Beograd	73.20	46.30
Stambul	Beograd	131.80	80.50
Stockholm	Malmö—Berlin	191.—	125.60
Trieste	Postumia	63.50	42.10
Warszawa	Szob	63.70	42.70
Wien-Ostbahn	Hegyeshalom	33.80	22.40
Zürich	Buchs	123.20	73.70
Kopenhagen	Praha	142.70	92.50

Vegetaranoj: Gvidantoj ges-roj Yelland, Gyöngyös, Hugai iskola, Hungarujo. Feminista kunveno ankoraŭ preparota.

9. Fakestroj bonvolu nepre sciigi ĝis fino de junio al la LKK, kiom da personoj anoncis sin por la fakksido kaj la programon de tiu kunsido.

10. Surpriza kongresmemoraro: Nova Baghy-libro! — Por pliriigi nian literaturon kaj havigi valorojn al la kongresano, oni eldonos novan libron de Julio Baghy: „Migranta Plumo“ enhavanta la du kongrestre-atraĵojn, novelojn kaj poemojn. Ĝi estos bela kongresmemoraro kaj interese legaĵo por ĉiu esperantisto. Prezo de la 160-paĝa libro estos tiel favora, ke ĉiu esperantisto povos ĝin akiri. Antaŭmendojn akceptas la LKK. Simpla, broŝurita eldono 1.65 sv. fk. (1.80 P.). Aperos ankaŭ luksa, bibliofila eldono por 3.60 sv. fk. (4.— P.). Kiu deziras alsendon tuj post apero, sendu ankaŭ la poŝtkostojn: 10%. Tiu ĉi prezoj validas nur ĝis la kongreso. La vendprezo estos poste P. 3.— kaj P. 5.—.

11. La Esperanto-Radioparolantoj de la stacioj: Bern, Breslau, Bruxelles, Huizen, Köln, Minsk, Paris, Stuttgart, Zürich promesis konigi la kongresan programon kaj urbon dum la Esperanto-disaŭdigo. LKK sincere dankas la valoran helpon kaj petas tiujn, kiuj aŭskultis la paroladon, sciigi LKK pri ĝi kaj sendu dankon al la koncerna stacio! Se oni ie alie povus fari Esperanto-paroladon, la LKK volonte sendus tekston pri Budapeŝt kaj pri la kongreso. La parolantoj bonvolu antaŭe sciigi la precizan tempon.

12. Paroladoj pri Budapeŝt. — La LKK kore dankas al ĉiuj societoj, grupoj kaj personoj, precipe en Antwerpen, München kaj Nürnberg. Plie al s-roj Andreo Ĉe, P. Balkányi, Frans Schoofs ktp. pro sukcesaj paroladoj pri nia kongresurbo. Ni plezure disponigas filmon kun esperanta teksto, fotografaĵojn kaj tekstojn al ĉiuj, kiuj povos bone uzi ilin ĉe parolado kaj garantios resendon aŭ pluensendon. Ni ankoraŭ ne ricevis sciigon pri ĉiu parolado koncernante Budapeŝton. Bonvolu sciigi nin, por raporto al loka estraro!!

13. Kliŝojn por gazetoj. — Kelkaj gazetoj kaj personoj kiuj petis tiujn por publikigo, ankoraŭ ne resendis ilin. Ĉar tuja resendo estas ĉefa kondiĉo de la prunto, ni petas ĉiujn, kiuj ricevis kliŝojn, bonvolu tuj resendi kaj sciigi numeron de l' gazeto en kiu ili aperis. Sendu la raportojn al la Urba Fremduloŝicejo Budapeŝt IV, Deák Ferencz u. 2.

14. Insigno-konkurso. — La konkurso bone sukcesis. La juĝantaro konsistanta krom anoj de LKK ankaŭ el reprezentantoj de la artindustria ĉeflernejo kaj de la urba Fremduloŝicejo, juĝis la

I-an premion al s-ro Jacinto Comella, Vich, Hispanujo.

II-an premion al s-ro Prof. R. Ruzička, Holešov, Ĉeĥoslovakujo.

III-an premion al s-ino Karlo Scherer, Budapeŝt.

La insigno estos tre valora kaj bela memoraro de l' kongreso, kiun ricevos ankaŭ la helpkongresanoj.

15. Hungara arta kaj domlabora ekspozicio okazos dum la kongreso en la Landa Hungara Artindustria Societo, kies aranĝantaro invitis ankaŭ la kongresanojn por rigardi la hungaran popolarton. Detaloj pri rabatoj kaj komunaj vizitaj sekvos.

16. Malkaraj manĝoj. — LKK sciigas, ke la kongresanoj povos ricevi malmultekostan matenmanĝon en la „centraj lakejoj“ (malgrandaj, modestaj, sed puraj kafejoj) situataj diversloke en la urbo, por P. 0.56 taso da kafo, bulko kaj butero kun mielo aŭ marmelado. La saman kun ovo por P. 0.80. Estas multaj restoracioj kie oni servas tagmanĝon (supo, viando, legomo kaj farunaĵo aŭ bakaĵo) jam por P. 1.20—1.50. Ekzistas ankaŭ vegetaraj restoracioj. La adresoj troviĝos en la kongreslibro aŭ en la gvidlibro.

Ni atentigas ankoraŭ pri la turista loĝejo anoncita en bulteno n-ro 2 (kun ĉiuj manĝoj 3.50) sed nur por limigita nombro.

Listo de la kongresanoj:

1. S-ino Blaise M. L., North Harrow, Angl.
2. S-ro Blaise P., North Harrow, Angl.
3. S-ino Merchant A. M., Sheffield, Angl.
4. S-ro Merchant J., Sheffield, Angl.
5. S-ino Ede M. M. L., Cardiff, Angl.
6. S-ro Ede E. H., Cardiff, Angl.
7. S-ro Robertson R., London, Angl.
8. S-ro Jakubowicz I., Antwerpen, Belg.
9. S-ro Bruno G., Aelfia, Italujo.
10. S-ro Aron E., Königsberg, Germanujo.
11. S-ro Csáder S., Bratislava, Ĉeĥosl.
12. S-ro D-ro Patai S., Budapeŝt, Hungarujo.
13. S-ro Tolnai P., Budapeŝt, Hungarujo.
14. S-ro D-ro Rhorer L., Pécs, Hungarujo.
15. S-ro Sieron A., Pécs, Hungarujo.
16. S-ro Guéritte T., Surbiton, Angl.
17. S-ro Mihalik J., Budapeŝt, Hungarujo.
18. S-ro Török P., Debrecen, Hungarujo.
19. S-ro D-ro Loránd L., Budapeŝt, Hung.

20. S-ro Kovács T., Rákosszentmihály, Hung.
21. F-ino Geers B., Antwerpen, Belgujo.
22. F-ino Van Ganse A., Antwerpen, Belgujo.
23. F-ino Van Ganse I., Antwerpen, Belgujo.
24. S-ino Fürth C., Dresden, Germanujo.
25. S-ro Kennedy D., Glasgow, Skotlando.
26. S-ino Le Brun G. M., London, Anglujo.
27. S-ro Le Brun P. C., London, Anglujo.
28. S-ro Schönrich K., Wiesbaden, Germ.
29. S-ino D-ro Patai G., Budapeŝt, Hung.
30. F-ino Lúbek E., Tallinn, Estonujo.
31. S-ro Bálint L., Adony, Hungarujo.
32. F-ino Macfarlane A. G., Glasgow, Skotl.
33. S-ro D-ro Philipp G., Paris, Francujo.
34. S-ro Goodland R., London, Anglujo.
35. S-ino Kunze J., Seifhennersdorf, Saksujo.
36. S-ro Kunze H., Seifhennersdorf, Saksujo.
37. S-ro Schüssler A., Kecskemét, Hung.
38. S-ro Zeidler W., Berlin, Germanujo.
39. S-ino Ravestein J. M., s'Gravenhage, Ned.
40. S-ro Ravestein I., s'Gravenhage, Nederl.
41. S-ino Yelland T., Gyöngyös, Hungarujo.
42. S-ro Yelland E. E., Gyöngyös, Hung.
43. S-ro Wright I., Birmingham, Anglujo.
44. F-ino Kubillus M., Königsberg, Germ.
45. S-ro D-ro Halmágyi G., Szombathely, Hungarujo.
46. S-ro Dittrich E., Wien, Aŭstrujo.
47. S-ro May J., Sulzbach-Saar, Saarterit.
48. S-ro Buchanan G. D., Glasgow, Skotl.
49. S-ro Sola Montserrat M., Terrassa, Hisp.
50. S-ro Vincent A., San Francisco, Usono.
51. S-ro D-ro Fehár, Szolnok, Hungarujo.
52. S-ro Haenen H., Heerlen, Nederlando.
53. S-ro Balkányi P., Budapeŝt, Hungarujo.
54. S-ino Gábor, Budapeŝt, Hungarujo.
55. F-ino Root L., New-York, Usono.
56. S-ro Osler S., Exemath, Anglujo.
57. S-ro Price-Heywood O. B., Southsport, Anglujo.
58. S-ro Deligny E., Saint-Omer, Francujo.
59. S-ro Tolnai B., Budapeŝt, Hungarujo.
60. S-ro Tolnai E., Budapeŝt, Hungarujo.
61. S-ro Arabeno M., Genova, Italujo.
62. S-ino Boatman V., Southend on Sea, Angl.
63. S-ro Boatman D. P., Southend on Sea.
64. S-ino Croston M., Westcliff on Sea, Angl.
65. S-ro Croston R. A., Westcliff, Anglujo.
66. S-ro Minkov S., Sofia, Bulgarujo.
67. S-ro Ferguson G. A., Lincoln, Anglujo.

104. S-ro Knoll K., Zittau, Germanujo.
105. S-ro Sturmer R. C. K., London, Anglujo.
106. S-ro Brückel F., Bockfließ-Wien, Aŭstr.
107. S-ino Boetticher F., Habelschwerdt, Germanujo.
108. D-ro Rosenstock S., Zagreb, Jugoslav.
109. S-ino Isbrücker C. J., den Haag, Nederl.
110. S-ro Isbrücker I. R. G., den Haag, Ned.
111. S-ino Kökény I., Budapeŝt, Hungarujo.
112. S-ro Kökény L., Budapeŝt, Hungarujo.
113. F-ino Göndör R., Budapeŝt, Hungarujo.
114. S-ro Christaller P., Stuttgart, Germ.
115. S-ino Hamann F. A., Wauwatosa, Usono.
116. F-ino Hamann E., Wauwatosa, Usono.
117. S-ro Hamann A. F., Wauwatosa, Usono.
118. S-ro Läufer A., Mainz, Germanujo.
119. F-ino Paumgartner M., Bern, Svislando.
120. S-ro Baghy J., Budapeŝt, Hungarujo.
121. S-ro Zöldy I., Budapeŝt, Hungarujo.
122. F-ino Burkhardt A., Falkenstein i. V., Germanujo.
123. S-ro Strausz S., Jászberény, Hungarujo.
124. S-ro Schwab J., München, Germanujo.
125. F-ino Mackenzie A., Glasgow, Anglujo.
126. S-ro Pankalla E., Breslau, Germanujo.
127. F-ino Moxon Gladys H., Pournville, Angl.
128. S-ino Firth A., Marsh Huddersfield, Angl.
129. F-ino Smith E. B., Barry-Glam, Angl.
130. S-ro Rakower B., Antwerpen, Belgujo.
131. F-ino Carter E. W., Bradford, Anglujo.
132. F-ino Sarnes G., Breslau, Germanujo.
133. F-ino Zamenhof L., Warszawa, Polujo.
134. S-ino Huddy Wallasey, Anglujo.
135. S-ro Huddy T. B., Wallasey, Anglujo.
136. S-ro Gütting E., Durlach, Germanujo.
137. S-ro Corke L. L. C., London, Anglujo.
138. S-ro McDonald A., London, Anglujo.
139. F-ino Leadly-Brown C., Wallasey, Angl.
140. S-ro Nišimura K., Paris, Francujo.
141. S-ro Eitner S., Salomvár, Hungarujo.
142. S-ro Palsberg M., Aarhus, Danujo.
143. S-ino Zamenhof H., Warszawa, Polujo.
144. S-ro Zamenhof F., Warszawa, Polujo.
145. S-ro Beck O., Augsburg, Germanujo.
146. F-ino Pirks M., Riga, Latvio.
147. S-ro Krysta L., Čef. Teschen, Ĉeĥosl.
148. S-ro Kirsch J., Čef. Teschen, Ĉeĥosl.
149. F-ino Juŝen S. O., Riga, Latvio.
150. S-ino Tolnai F., Budapeŝt, Hungarujo.
151. F-ino Culvert J., Chicago, Usono.

Germanujo.

Langenberg (Rhd.). Dum la Pentekostaj tagoj okazis renkontiĝo de pli ol 100 anoj de LEA kaj SAT el Rejnlando kaj Vestfalio. La kunveno sub signo de kamaradeco kaj gajeco pritraktis en bela arbara loko diversajn aktualajn demandojn.

Neckargartach. Post klopodoj de s-ano Höpfer, la komunuma konsilantaro de Neckargartach, antaŭurbo de Heilbronn, decidis enkonduki Esperanton fakultative en lernejo, pagi la lernolibron kaj doni subvencio de 130 rmk. por unu jaro. Instruos s-ano Höpfer. Por la kurso anoncis sin jam 45 geknaboj. En „Neckar-Echo“ ĉiuvendrede aperas Esp. angulo, redaktata de s-ano Eackmann en Heilbronn. — Oni sendu gratulojn al la komunuma konsilantaro (magistrato) laŭ adreso: Gemeinderat, Neckargartach bei Heilbronn.

Polujo.

Kielce. Grandan sukceson atingis kun helpo de instruistino s-ino A. Gedlička s-ro D. Frischmann. Esperanto estas enkondukita en la ŝtatan popollernejon kiel laŭvola lernfako. Dufoje semajne okazas lecionoj por grupo de 15- ĝis 17-jaraj knaboj. La instruistaro favoras la aferon.

Krom tio daŭre funkcias du kursoj en la knabina lernejo de s-ino Wolman Zimnovoda. Ĉiusemajne okazas kunvenoj de rondo „Antaŭen“. La kurson gvidas f-ino Goldšajder. Biblioteko nombras ĉ. 150 librojn.

Warszawa. Akademia Esp. Rondo ĉe J. A. H. lastatempe havis jenajn klubajn vesperojn: La 14. 4. vespero dediĉita al memoro de D-ro Zamenhof; la 5. 5. parolis s-ro Dratwer pri la temo: „En sanktejo de la 10-a muzo“; la 19. 5. parolis s-ro Mazur pri „Gvidideoj de Talmudo“. Ĉiuj vesperoj estis multnombro vizitataj kaj bone sukcesis. La 19. 5. komenciĝis nova kurso kun 15 p. Gvid. s-ro Folman. La rondo kore invitas ĉiujn eksterurbajn kaj -landajn gesamideanojn viziti ĝin (dimanĉe kaj ĵaŭde 20—22.30 h.). Eksterlandaj s-anoj scipovantaj publike prelegi estas petataj sciigi tion al la estraro de A. E. R., Novy-Swiat 21.

Svedujo.

Pri tre grava decido de la sveda parlamento ni publikigos detalan artikolon en la venonta numero de Heroldo.

Letierkesto.

K. L. en P. kaj R. S. en F. Atentu la afrankan tarifon! La samo validas por multaj aliaj; preskaŭ ĉiutage alvenas iu letero aŭ poŝtkarto ne sufiĉe afrankita kaj por kiu ni devas pagi punafrankon. Do, bonvolu atenti ĉiu skribanto pri la ĝusta afranko.

R. P. en M. Bonvolu vin turni al firmo de koncerna branĉo! Ni ne povas havigi ĉiuspecajn komercaĵojn. Volonte ni liveras al vi librojn kaj insignojn laŭ nia katalogo, aŭ presajojn kaj similaĵojn; sed ni ne povas liveri komercaĵojn, kiuj estas ekster nia branĉo. Eventuale vin turnu al Komercista Esp.-Unio, Dresden-Radebeul, Germanujo!

T. U. en O. Petante informon, bv. aldoni almenaŭ respond-kuponon de poŝto aŭ de UEA!

Internacia rondo ĉe Sveda Esp. Kongreso. Koran dankon pro via karto kun multaj subskriboj!

Ek' al Budapeŝt!

La formo: „Ek!“ povas ŝajni stranga al iu leganto. Tamen ĝi estas vere Esperanta, eĉ tute laŭfundamenta. Krom tio ke ĝi estas la prefikso signifanta la komencen de io, oni povas ĝin kompreni kiel mallongigon de „ekpreparu, ekiru, ekvojaĝu ktp.“. Serĉante efikajn titolojn por la hodiaŭa numero, similajn al la germana esprimo: „Auf (wohlauf, frischlauf) nach Budapeŝt!“ = „Supren (bone supren, freŝe supren) leviĝu por iri al Budapeŝt!“, ni ne povis trovi pli taŭgan solvon ol ĝuste la mallongan, traŝan, jam ekzistantan: „Ek!“ (Ek' al la kongreso! — Ek' al batal'! — Ek' en la novan jaron! — Ek' por paco kaj konkordo!)

Avorto! Ĉu malkaraj pelerinoj?

Lastatempe iuj firmoj ofertas al esperantistoj malkarajn pelerinojn el „fiŝaŭto“ aŭ simila materialo. Kelkfoje okazis, ke samideanoj, antaŭpaginte al tia firmo, ricevis senvaloraĵon, kiu difektigis ĉe la unua provo porti ĝin. Samideanoj, fermu viajn poŝojn kontraŭ tiaj firmoj! Unue postulu la varon, kaj nur poste pagu, kiam vi konstatis, ke la varo efektive taŭgas. Sed

neniel antaŭpagu al tiaj firmoj!

Mendu la hodiaŭan

Budapeŝtan Numeron

de Heroldo por viaj grupmembroj kaj kursanoj.

La Budapeŝta numero estas 12-paĝa. Sed pro tio, ke la 12 paĝoj superas la afrankan limon de 50 gramoj, ni liveras al ĉiuj abonantoj, kiuj ricevas Heroldon sub banderolo kaj ĉe kiuj ni devus pagi duoblan afrankon, hodiaŭ nur 10 paĝojn, kaj la restajn du paĝojn ni liveros al ili kune kun la sekvonta numero.

De la Budapeŝta numero ni presis 5000 ekzemplerojn. El ili ĉ. 1200 estas ankoraŭ

disponeblaj je malalta prezo. Do, mendu ĝin tuj por viaj grupmembroj kaj kursanoj!

Prezo de la 12-paĝa Budapeŝta numero tri-kolore presita (nur kun samtempa pago; al Germanujo ni liveras ankaŭ kontraŭ rembursoj):

1 ekzemplero	RM 0.30;
10 ekzempleroj	RM 1.25;
50 ekzempleroj	RM 6.—;
100 ekzempleroj	RM 11.—.

68. S-ro D-ro Vörös C., Budapeŝt, Hung.
69. S-ro Váry J., Miskolc, Hungarujo.
70. S-ro Onnen M. F., s'Gravenhage, Ned.
71. S-ro Tóth G., Nagykanizsa, Hungarujo.
72. S-ro Ifflaender H., Breslau, Germanujo.
73. S-ro Kiglits I., Pécs, Hungarujo.
74. S-ro Kiglits, Pécs, Hungarujo.
75. S-ino Merrik M. C., Shepperton, Anglujo.
76. S-ro Merrick W. P., Shepperton, Anglujo.
77. S-ro D-ro Hagymásy A., Nagylónya, Hungarujo.
78. S-ino Schmalzl J., Weiden, Germanujo.
79. S-ro Schmalzl J., Weiden, Germanujo.
80. F-ino Maultz M., Frysztat, Ĉeĥoslovak.
81. S-ro Maultz, Karwina, Ĉeĥoslovakujo.
82. S-ro Schojbert O., Timisoara, Rumanujo.
83. S-ro Satchell H. H. C., Leytonstone, Angl.
84. S-ro D-ro Spielmann E., Bern, Svislando.
85. F-ino Tröger M., Falkenstein i. V., Germ.
86. S-ro Végh A., Pécs, Hungarujo.
87. S-ino Balkányi I., Budapeŝt, Hungarujo.
88. S-ro Tihanyi J., Budapeŝt, Hungarujo.
89. S-ino Kozma N., Budapeŝt, Hungarujo.
90. S-ro D-ro Kozma K., Budapeŝt, Hung.
91. S-ro Cart T., Paris, Francujo.
92. S-ino Thilander V., Stocksund, Svedujo.
93. S-ro Tilander H., Stocksund, Svedujo.
94. S-ro Kreitz J., Kreuzau b. Düren, Germ.
95. F-ino Kohn J., Alba Julia, Rumanujo.
96. F-ino Schwartz M., Alba Julia, Rumanujo.
97. S-ro Carotti S., Montesilvano Marina, It.
98. F-ino Koller K., Garolden, Aŭstrio.
99. S-ino Satzenhoffer, Wien, Aŭstrio.
100. S-ro Satzenhoffer K., Wien, Aŭstrio.
101. S-ro Kennigott A., Austin, Usono.
102. S-ro Blair W. J., Paislay, Skotlando.
103. F-ino Vinkovic D., Zagreb, Jugoslavujo.

152. S-ro Hub F., Gablonz, Ĉeĥoslovakujo.
153. S-ro Hub O., Gablonz, Ĉeĥoslovakujo.
154. S-ro Seidenberg J. A., Köln, Germanujo.
155. S-ro Levy Arrigo, Trieste, Italujo.
156. S-ro Leb Imre, Orsova, Rumanujo.
157. S-ro Nedbal L., Orsova, Rumanujo.
158. S-ro Nagy-Molnár I., Budapeŝt, Hung.
159. S-ro D-ro Fischer O., Dessau, Germ.
160. S-ino Raisz S. M., New-York, Usono.
161. S-ino Skulina L., Ces. Teŝin, Ĉeĥosl.
162. F-ino Kingsinger M., St. Ingbert, Saarter.
163. S-ro Telling J., Groningen, Nederlando.
164. S-ro D-ro Fulda R., Berlin, Germanujo.
165. S-ro Kulcsár K., Budapeŝt, Hungarujo.
166. S-ro Droste A. P. George, Utrecht, Ned.
167. S-ro Bofill N., Palma de Mallorca, Hisp.
168. S-ro Lajos G., Pécs, Hungarujo.
169. F-ino Nicol A. A., Glasgow, Skotlando.
170. F-ino Craig M. I., Glasgow, Skotlando.
171. F-ino Dougall G., Glasgow, Skotlando.
172. S-ro Kiem W., Wesermünde-L., Germ.
173. S-ro France G. A., Birmingham, Angl.
174. F-ino Foster A., Amfield Plain, Anglujo.
175. S-ino Melrose M. B., Edmondsley, Angl.
176. S-ro George A. W., Stapleford, Anglujo.
177. S-ino Dietz H., Augsburg, Germanujo.
178. S-ro Greff H., Elbing, Germanujo.
179. F-ino Baird J., Edinburgo, Skotlando.
180. F-ino Duncan N. P., Edinburgo, Skotl.
181. F-ino Sempie F. M., Edinburgo, Skotl.
182. F-ino Cochran I. M., Dunfermline, Skotl.
183. S-ro Warden J. M., Edinburgo, Skotl.

Helpembroj.

1. S-ro Epstein F., Hamburg, Germanujo.
2. S-ino Baghy E., Budapeŝt, Hungarujo.
3. S-ro Tarnov P., Galkhausen, Germanujo.

Kroniko de l' Esperanto-movado.

Aŭstrio.

Waidhofen a. d. Ybbs. Mond-Junular-Ligo, sekcio Aŭstrujo, kunvenis ĉi tie je Pentekosto por preparoli plej diversajn problemojn rilate kulturan laboron, Okazis ankaŭ parolado pri Esperanto en germana lingvo kaj esperantlingva saluto. Laŭ decido de la Plenkunveno, la membroj aprobis okupadon pri Esperanto, kies valoro por la nova sociordo estas rekonata.

Belgujo.

Nieuport. Fondiĝis Esp.-klubo Kurson faras s-ro Benoit, hotelposedanto en Oostdunkerke, del. de UEA.

Britujo.

Lancashire kaj Cheshire Esp. Federacio. La proksima Konferenco havos lokon la 29. 6. en Hardcastle-Craggs. Oni volas aranĝi ke ĝi havu lokon samtempe kun la Federacio de Yorkshire, kaj samideanoj en ambaŭ Federacioj estas petataj noti tiun daton por sukcesigi la interfederacian Konferencon.

Ĉeĥoslovakujo.

Praha. 4. 5. 1929 finiĝis dumonata Esperanto-kurso aranĝita de Esp. Klubo. El 19 aliĝintaj lernantoj restis 13. — 3. 5. kaj 10. 5. okazis paroladoj de samideano Gargula, kiu tre interese referis pri siaj spertoj en Rusujo.

Jam antaŭ la Budapesta Kongreso Pecon de Hungaruj

representas la multkoloraj famaj hungaraj vilaĝanin-brodaĵoj.

Sen sendkosto, dogano vi jam povas nun ricevi registritan specimeno! Tablotuko de sv. fk. 14.— malgrandaj rondaj tukoj de sv. fk. 3.—

Mendojn peras P. Balkányi, del. de UEA, Budapest VI, Hajós-u. 15. Antaŭpago necesa!

Ĉefagentejo kaj Deponejo

por ĉiuj landoj, de angla firmo, minimume ft. st. 30.— bankgarantio, artiklo tre facile vendebla, certa profito. Nur tre aktivaj interesiĝantoj, kiuj havas bonajn rilatojn al apotekoj kaj drogerioj skribu al

Universala Esperanto-Asocio, Hradec Králové-623, Ĉeĥoslovakio. „Angla Fermo“.

Ĉiujn viajn hungarajn bank-negocojn

plej avantaĝe aranĝas la Peŝta Hungara Komerca Banko, Budapest V, gróf Tisza István-utca 2.

Dolarhipotekletoj, - Eksportsekcio, Korespondantoj en la tuta mondo. Oficiala Banko de la XXI-a Universala Kongreso de Esperanto.

Se vi ne povas veni al la Kongreso, vizitu por tri tagoj Budapeston!

Por 80 pengoj vi ricevas en ĉiuj bileteventoj biletkajeron rabatitan kiu rajtigas 3 tagan restadon en unuaranga hotelo kun kompleta nutrado, aŭtobus-rondiroj, vojaĝrabatoj, ktp.

»IBUSZ« turisma, aĉeta, vojaĝa kaj transporta A. S., Budapest V, Vigado-ter 2.

VIZITU

la reĝinon de la Danubo!

BUDAPEST

estas la plej granda banurbo de la mondo.

Informojn, programojn, prospektojn sendas, ekskursojn aranĝas: Fremdul- oficejo de la Ĉefurbo Budapest, V., Deák Ferenc-utca 2.

Baldaŭ aperos

Nova eldono

de antaŭaj Esperanta Sintakso kaj Esperanta Vortfarado

sub titolo:

Paul Fruictier

Kompleta Gramatiko kaj Vortfarado de Esperanto

reviziita kaj kompletigita kun helpo de l' aŭtoro de S. Grenkamp-Kornfeld, kunaŭtoro de Plena Vortaro de Esp. Grandformata: 15×23 cm, ĉ. 200-paĝa.

Eldonejo: Esperantista Voĉo, Jasło (Pollando).

PRESAĴOJ

leterfolioj, poŝtkartoj, kovertoj, fakturoj, vizit- kaj bondezirkarioj, negocaj formularoj, prospektoj, katalogoj, revuoj, ĵurnaloj kaj libroj. Ni presas unu- kaj diverskolore sur bona papero.

Presejo de Heroldo de Esperanto, Köln Brüsseler Str. 94, Germ.

Esperanto-Adresaro 1929/30

de Sudokcidenta Germanujo

eldonita de „Sudokcidentgermana Esperanto-Ligo (SOL)“ kaj „Suda Ligo, Laborunuiĝo de Esperantistoj en Baden-Württemberg“

enhavas la precizajn adresojn de 600 ligoj en 102 lokoj. Prezo de unu ekz. inkl. afr. 2 poŝt- aŭ UEA-respondkuponoj; por germanoj 35 pf.

Havebla ĉe

Sudokcidentgermana Esperanto-Ligo, Walkmühlstr. 25, Wiesbaden (Germ.).

Jus aperis

la germanlingve verkita propaganda broŝuro de D-ro J. Kreutzer, studkonsilisto en Frankfurt a. Main

Esperanto ein Kulturgut? Sein Wesen und Wert im Feuer der Kritik.

(Esperanto — kulturvaloraĵo?)

Gia esenco kaj valoro en la fajro de la kritiko.)

Prezo RM 1.80

plus RM 0.20 sendkosto.

Havebla ĉe

Libreja Fakoj de Heroldo
Köln, Brüsseler Strasse 94, Germ.

BURKBRAUN

Ĉokolado Kakao Pralinoj

estas neatingitaj en kvalito kaj prezindeco. Eksporto al ĉiuj mondpartoj! Komercaj interligoj serĉataj kun bonfamaj importfirmoj.

Burk & Braun, Cottbus

Sendu mendojn per Komerĉista Esperanto Unio Dresden-Radebeul.

Nova tre interesa libro

aperis en Britujo. Ĝi estas verkita de la fama H. G. Wells. Tradukis ĝin A. Frank Milward. Ĝia titolo estas:

La dormanto vekiĝas

Prezo tole bindite RM 5.50, broŝurite RM 3.90 (por sendkosto aldonu 10%).

Heroldo de Esperanto, Köln, Germ.
Fako: Librejo.

Kie loĝi en Budapeŝt?

Esperantistoj certe preferos restadon en la unuaranga, komforta

Hotelo Continental

Entrepreno de Universala Esp. Asocio

Dobány utca 42, Budapeŝt VII

Atenŭ! Maloftaĵ!

Ni sukcesis ricevi en nian stokon ankoraŭ pli grandan kvanton da ekzempleroj de unu el la plej interesaj (laŭ enhavo) kaj belstilaj libroj de la Esperanto-literaturo, la preskaŭ jam elĉerpitan verkon

Princo Serebrjanij

Ĝi estas konata historia romano de A. Tolstoj; tradukis ĝin la konata rusa samideano M. Sidlovskaja.

Prezo rmk. 3.60 (4.50 sv. fk.) ĉe

Heroldo de Esperanto
Fako: Librejo
Köln

Jus aperis:

D-ro L. L. Zamenhof Esperanto-Paroladoj

faritaj ĉe la malfermo de universala kongreso de Esperanto 1905—1912.

Kun enkonduko pri programo kaj deveno de l' Esperantismo, akompanata germana traduko kaj rimarkoj. Artisma foto de l' Majstro sur kreta papero, bela preso, 170 paĝoj da teksto.

Prezo RM 1.20.

Eldonis

D-ro Emil Pfeffer,

Gazetara gvidanto de Aŭstria Esperanto-Delegitaro.

Mendebla ĉe

Libreja Fakoj de Heroldo
Köln, Brüsseler Str. 94

Pensiono Wilkory en Piešťany (Piŝtjan) Ĉeĥoslovakio

Malfermo je la 1-a de Junio — Unuaranga, tre komforta kaj malkara loĝado — Samideanoj ricevas rabaton — Prospektoj kaj korespondado en Esperanto de s-ro Ludoviko Wiltschek, delegito de UEA.

Adreso ĝis 1-a de Junio: L. Wiltschek, Bratislava, Dlhá 35, Ĉeĥoslovakujo.

Bonvolu rekomendi inter Viaj rondoj kaj konatoj!

Mondkonata banloko kontraŭ reŭmo, iskiatiko, ktp.

Fama esploristo

de astrologio horoskopos pri via estonteco



Li diros al vi, ĉu vi havos sukceson en diversaj aferoj, kaj aliajn interesindaĵojn. Postulu senhezite senpagan horoskopon, indikante vian naskiĝdaton! Aldonu laŭvole iun sumeton por la klopodo kaj afranko!

Welt-Kultur-Verlag
Berlin W 8 / C 330

La 21-a Universala Kongreso de Esperanto en Budapeŝt

estos grandioza manifestacio mezeŭropa de nia movado.

Ĉu vi ne povos ĉesŝi?

Mendu tuj la gazeton

Hungara Heroldo

kaj informiĝu pri la mondkongreso, pri Budapeŝt kaj pri la hungara kulturo. — En 1929: 14 numeroj. — Grandparte esperantlingva teksto.

Jara abono por eksterlandanoj 7 (sep) svizaj frankoj.

Redaktejo

kaj administrejo: Budapeŝt X, Pongrác-ut. 17-XIV-71.

Fianĉiĝo.

Fianĉiĝis s-ano Vladimir Mandulov, prez. de „Signo de l' Espero“ kun f-ino Katja V. Kesjakova en Plovdiv je 6.5.29. Koran gratulon!

Fianĉiĝo.

Fianĉiĝis s-ano Krstju Georgiev, sekr. de „Signo de l' Espero“ kun f-ino Flora Janakova en Stanimaka, Bulgarujo. Ni kore gratulas!

Fianĉiĝo.

Fianĉiĝis s-ano Nikola A. Dragino kun f-ino Maria Nateva en Stanimaka, Bulgarujo. Koran gratulon!

Lingvo Internacia.

Por kompletigi kolekton oni bezonas volumon 1899 de ĉi tiu gazeto. Skribu oferton al BEA, 142 High Holborn, London WC 1, Britujo. (78)

Belegaj flagetoj

por la tablo. 15×24 cm. Silka ŝtofo kun kudrita stelo. 6.50 sv. fk. afrankite, Eldona Societo Esp., Fack 698, Stockholm 1, Svedujo. (79)

Unika!

Kursa vortaro. Verkita de la gelernantoj en la kurso de Andreo Ĉe kaj Tiberio Morariu. Hektografita. 40 paĝoj. Prezo 1.50 sv. fk. afrankite. Eldona Societo Esperanto, Stockholm, Svedujo. Malgranda provizo! (80)

Devi Angreni kaj Mak Miah

estas du tre interesaj rakontoj pri la moroj sur la insulo Javo. Ili troviĝas en la unua duobla volumeto de „Ilustrita Biblioteko“. Prezo de la duobla volumeto 1/2 kun supre nomitaj rakontoj rmk. 1.— (+ 0.10 por sendkosto). Mendu ĝin ĉe la Libreja Fakoj de Heroldo, Köln, Brüsseler Str. 94. (81)

Ĉu vi scias . . .

ke oni jam ekvendis silkajn poŝtuketojn por esperantistoj je malalta prezo? Ilustritan novan prezaron pri tiuj kaj aliaj karakterizaj produktaĵoj el la lando de la leviĝanta suno, Japanujo, tuj poŝtkarte postulu de: Hiroshi H. Yamada, UEA vic-del., P. O. Kesto 11, Akatsuka, Nagoya, Japanujo. (83)

Ĥinujo

nuntempe speciale interesas la tutmondon. Pro tio estas rekomendinda la legado de modernaj finaj verkoj. Nur rmk. 0.50 (+ 0,10 por sendkosto) kostas la moderna ĵu-akta fina dramo „Ribelemaj Virinoj“ (Uan Ĉaŭ Ĉin) de la fama verkisto M. Ĉ. Kuo kaj tradukita de nia samideano S. M. Ĉun. Mendu ĝin ĉe la Libreja Fakoj de Heroldo en Köln, Brüsseler Str. 94. (82)

Pri Esperanto-gazetaro

kaj Esperanto-jurnalismo kun seriozaj samideanoj el ĉiuj landoj deziras korespondi Ludwig Goppel, Von-Merodestr. 36, Horrem-Köln, Germanujo.

Reklamaj presajaĵoj.

Ĉiuj samideanoj bonvole sendu al ni ĉiajn ajn reklamajn presajaĵojn kun desegnoj (ne sole skribitaj en Esperanto, sed ankaŭ en aliaj lingvoj). Interŝanĝe ni tuj sendos al vi samspecajn. Adresu: Adman & Co., 1 choome, Horizumechoo, Nishiku, Nagoya, Japanujo. (84)

Angla knabo

15-jara deziras korespondi kun esperantistoj per ilustritaj poŝtkartoj. Certe respondos. Brian Field, 66 Bankfield Rd., Huddersfield, Britujo. (85)

Du ĵunaj Bosnianinoj

deziras korespondi pri ĉiuj temoj per ilustritaj poŝtkartoj. Korespondos kun samideanoj de la tuta mondo. Adreso: SCHATZ Habijanac kaj Tinĉi Perl, Bos. Brod, Jugoslavio.

Korespondado.

Samideanoj! Mi deziras korespondadon kun Parizano, Berlinano, Hindo kaj Ĥino. Korespondos pri ĉiuj temoj. Tajlor Einar Persson, Renstjärnasgatan 21, (ĉe Brunzell), Stockholm Sö., Svedujo.

50 soc. gejunuloj

deziras korespondadi individue kaj kolektive per ilustritaj poŝtkartoj kaj leteroj. Adreso: G. Nitzsche, Chemnitz 16, Zwickauerstr. 152, Germanujo.

22-jara komercoficisto

deziras korespondi per leteroj, ilustritaj poŝtkartoj kaj fotoj kun sinceraj gekorespondantoj el ĉiuj landoj. Nepre tuj respondos. Fraŭlo Boris Ivanov, str. Caribrodka n-ro 13, Varna, Bulgarujo.

Korespondado.

Fraŭlo Dimitr Kostov, str. „Pirin“ n-ro 37, Varna, Bulgarujo, 22-jara, deziras korespondi per leteroj, ilustritaj poŝtkartoj kaj fotoj kun ĉiuj landoj kaj pri ĉiuj temoj. Certe respondos!

Sudameriko!

Inĝeniero ŝatus havi korespondanton aŭ korespondantinon el Sudameriko. Johano Tomán, Budapeŝt VII, Erzsébet krt. 16. 4. 23.

Gesamideanoj vizitantaj Kolonjon

ne preterlasu viziti la kunsidojn de la Esperanto-grupo en restoracio „Zur Glocke“, Am Hof 14, malantaŭ „Heinzelmännchenbrunnen“, tuj apud la katedralo, proksime de la stacidomo; ĉiumerkrede 21 h.

